

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

NE ESTAS DU
BULGARIOJ

KUN RIGARDO
AL LA UZINOJ

TURISMA
SIMPOZIO

KIK'85

GRAVEGA
HISTORIA
EVENTO

BULGARA
ANTOLOGIO

JAPANAJ
PACAMIKOJ

30-a DANUBA
REMADO

LINGVAJ
DEMANDOJ



„NE ESTAS DU BULGARIOJ!...



Grafikaĵo de Angel Angelov

En la kuranta jaro nia popolo festas la 100-jaran datrevenon de la Unuiĝo de Bulgario.

Certe ne estas simila evento en la mondhistorio!

Unu popolo, ĵus liberiginta de kvinjarcenta fremda jugo, falas en alian, pli malfacilan kaj humiligan staton, estas submetita al novaj suferoj.

3-a de marto 1878, Tago Unua de libera Bulgario! La subskribita en San Stefano packontrakto proklamas la renaskiĝon de la bulgara popolo el la malestado de la sklaveco.

En la eŭropaj politikaj medioj regas maltrankvilo. Post kvincentjara fremda jugo denove estas kreita forta slava ŝtato, unuiĝita en siaj etniaj limoj. La reago ne malfruigas. La Berlina Kongreso, kunvokita en junio-julio 1878, denove „tajlas“ la mapon de la Balkana Duoninsulo. Bulgario estas dividita en tri partojn — vasala Princlando Bulgario, Orienta Rumelio — aŭtonoma regiono, kaj Makedonio kaj la regiono de Adrianopolo denove estas sub osmana regado. La egoismaj interesoj de la grandaj eŭropaj ŝtatoj alportas sur la Bal-

kanoj ne pacon kaj trankviliĝon, sed malamiĝecon kaj streĉitecon.

La reakciaj klaŭzoj de la Berlina Kongreso kaŭzas amasan, tutpopolan malkontenton kaj veran rezistan movadon en ĉiuj bulgaraj regionoj. La idealo pri unuiĝo estiĝas alta celo de la bulgara nacio. En daŭro de sep jaroj nek en la Princlando, nek en Suda Bulgario, ironie nomita de la Kongreso „Orienta Rumelio“, nek en Makedonio pasas eĉ unu trankvila tago. Gazejoj kaj broŝuroj, sendepende de ilia politika orientiĝo, aperigas flamajn artikolojn pri unuiĝo de la patrolando. Ĉe-kape de tiu agado ekstaras la komitatoj „Unueco“, kreitaj somere de 1878 de eksaj partoprenantoj en la naci-liberiga batalo. En mallonga tempo la tuta lando estas kovrita de densa reto de tiaj komitatoj.

En 1880 en Princlando Bulgario kaj en Orienta Rumelio estas kreitaj sekretaj organizaĵoj, celantaj prepari la unuiĝon, varbante adeptojn kaj havigante armilojn. Ilia agado aparte aktiviĝas fine de 1884 kaj komence de 1885, ekhavas karakteron de tutpopola movado por unuiĝo de Bulgario per armita ribelo. En Orienta Rumelio, kies ĉefurbo estis Plovdiv, ĉe-kape de la fondita sekreta komitato, kiel ĝia prezidanto ekstaras Zahari Stojanov — revoluciulo kaj sociaganto, ĵurnalistoj kaj eminenta memuaristo. El sub lia talenta plumo, en la redaktata de li gazeto „Borba“ („Batalo“) aperas vico da artikoloj, alvokantaj la popolon al unuiĝo.

Fine venas la granda tago! Frumatene la 5-an de septembro 1885 en vilaĝo Goljamo Konare, kie estas formita la plej granda en la lando taĉmento el ĉirkaŭ 700 homoj, sub la gvido de Prodan Tiŝkov — Ĉardafon, la sonorilegoj eksonas alvokante la homojn. Sur unu tablo sur la placo, kuŝas la standardo — sur verda ŝtofo la ikonpentristo Georgi Danĉov per orkolora farbo estas pentrinta leono. En la anguloj estas skribitaj revoluciaj versoj de Karavelov kaj Botev. La ribeluloj kisas la standardon kaj la krucigitajn du sabrojn, ĵuras esti fidelaj al la revolucia faro. La taĉmento kantante ekmarŝas al Plovdiv — la ĉefurbo de Orienta Rumelio, por preni la ŝtatpovon. Apud Ĉardafon rajdas lia fianĉino Nedjalka Sileva, ĵus fininta la gimnazion en Plovdiv, kiu havis la honoran taskon kudri la standardon de la ribelo. Survoje al Plovdiv al la ribeluloj aliĝas ankoraŭ multaj vilaĝanoj el la proksimaj vilaĝoj. Antaŭ la urbo ilin atendas la du batalionoj de majoro Danail Nikolaev. Ĉirkaŭ la 4-a

(Daŭrigo sur p. 6)



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 54
NOVEMBRO
11 • 1985

KUN RIGARDO AL LA UZINOJ!...

En la historio de la bulgara E-movado estas gloraj paĝoj, kiuj rakontas pri la agado de la laboristaj esperantistoj. Sed kontraste al tio mi konstatas, ke en la nuntempa E-movado la laboristoj, teknikistoj kaj inĝenieroj (el la uzinoj) estas malmultenombraj.

Ni ne povas fari nun analizon de tiu negativa fenomeno en la organiza stato de BEA. Certe la kaŭzoj estas kompleksaj kaj sufiĉe komplikaj.

Sed kion ni devas entrepreni por korekti tiun aŭferstaton?

Trafan respondon ni povas trovi en la praktiko de DE de BEA en Gabrovo. Tiurilate el la konciza, sed riĉenhava eldiro de k-dino Stejka Toteva, la delegitoj de la 41-a kongreso de BEA havis eblecon informiĝi pri la sperto de gabrova-
noj. (La eldiron de S. Toteva legu sur p. 11)

Si rakontis pri la agado de la fondita uzina E-societo „Eutim Apostolov“ en la Panprodukta Uzino. El ŝia kontribuaro oni multon povas lerni pri la utila laboro de tiu specifa E-societo. Krome oni povas ankaŭ apliki tiun sperton, konforme al la konkretaj kondiĉoj ankaŭ en aliaj produktad-entrepreno en nia lando.

Kio estas la plej grava en la sperto de E-societo „Eutim Apostolov“?

La plej grava estas tio, ke la esperantistaj laboristoj kaj teknikistoj organizis korespondadon kun siaj kolegoj el aliaj landoj. Rezulte ili ricevis interesajn informojn rilate la panproduktadon. Laŭ la ricevitaj konkretaj informoj kaj prospektoj la uzinaj inĝenieroj kaj teknikistoj sukcesis ratiigi la ekzistantajn en la uzino maŝinojn, eĉ inventi novan pli konvenan por la bulgaraj faruntipoj maŝinon. La uzino plialtigis la produktivecon de la laboro kaj la kvaliton de la produktaĵoj, variigis kaj riĉigis la uzinan nomenklaturon, plibonigis senteble la priservadon de la loĝantaro per altkvalitaj kaj novtipaj produktaĵoj.

Jen konkreta ekzemplo pri utiligo de Esperan-

to por solvo de ekonomikaj taskoj, antaŭviditaj en la ŝtataj kvinjaraj planoj.

La tiudirekta agado de la uzinaj esperantistoj ne nur alportis ekonomiajn sukcesojn al la laborokolektivo. Samtempe oni elokvente pravas la utilecon de Esperanto al la neesperantistaj laboristoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj gvidantoj de la uzino.

Do la plej bona propagandformo estas konkreta utiligo de Esperanto por interesaj kaj socie gravaj aferoj.

Ni rekomendas al la distriktaj kaj societaj estraroj de BEA direkti aktive sian organizan laboron al kreo de stabilaj E-societoj en la lokaj entreprenoj kaj institucioj.

Kio estas necesa tiurilate?

— Ekinteresiĝi la prezidanton de la uzina aŭ institucia sindikata organizaĵo.

— Gajni por simila afero ankaŭ la partian sekretario de la uzino.

Starigi per ilia helpo la saman demandon antaŭ la administracio de la entrepreno — la direktoro kaj ĉefinĝeniero.

Se necese, oni povus serĉi ankaŭ la subtenon de pli altaj partiaj instancoj, ekz. de la organiza fako de la komunuma aŭ distrikta partia komitato.

Por ne disigi la disponeblajn fortojn de la distriktaj societaj estraroj de BEA, oni koncentrigu siajn klopodojn komence nur al unu-du uzinoj, kie la grundo estas plej fekunda. Post bona funkciigode la novekreita uzina E-societo, post akumulado de valora sperto, prezentanta intereson por la konkreta uzino, oni transiru al simila organiza laboro en aliaj uzinoj. Oni povas uzi ankaŭ aliajn formojn, ekz. ekinteresiĝi kelkiujn gelaboristojn, kiuj metu la demandon pri E-kurso antaŭ la estroj de la sindikata kaj partia organizaĵoj ktp.

Do, ek al laboro!

INTERNACIA SIMPOZIO PRI TURISMO



Dum kunsido de la Simpozio. De maldekstre dekstren: inĝ. A. Todorov, s-ro Grégoire Maertens kaj mag. A. Pettyn

En la Esperanto-mondo ekzistis opinio, ke post la Manila Deklaracio de la Monda Turisma Organizaĵo (MTO) (1980), dokumentoj de speciala simpozio devus krei kondiĉojn por nova, pli klara kaj logike pli engaĝita rezolucio akceptota flanke de MTO koncerne la eblecojn de Esperanto kiel rimedo por solvo de nuntempaj kaj estontaj problemoj en la libera evoluo de turismo.

La ĉefaj organizantoj de la Simpozio „Lingvaj obstakloj al la libera evoluo de turismo“ (11–17. 09. 1985, Pisanica, Bulgario) estis UEA, la Internacia Organizaĵo „Monda Turismo“ kaj Bulgara Esperantista Asocio. Estis starigitaj kontaktoj kun gravaj funkciuloj de MTO — s-ro G. C. Fighiera (Hispanio), s-ro M. Lengyel k. a. kaj ankaŭ de la Bulgara Asocio por Turismo kaj Ripozo (BATO).

En la simpozio partoprenis funkciuloj el 11 landoj (Belgio, Bulgario, Greklando, Hungario, Hispanio, Italio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, Sovetio, Svedio) kaj reprezentantoj de kvar neesperantistaj organizaĵoj kaj de la Pola Radio — entute 33 personoj. Krome venis buso kun polaj E-gvidantoj kaj infana kantgrupo.

Dommaŝtro de la simpozio estis la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. Ĉe bonegaj laborokondiĉoj, disponante pri la necesa dokumentaro, la partoprenantoj en la simpozio kunsidis en lukse aranĝita konferenĉalo.

La ĉefdirektoro de IEK inĝ. Angel Todorov bonvenigis la ĉeestantojn. Nikola Aleksiev — honora prezidanto de BEA, per varmaj vortoj salutis ĉiujn en la nomo de BEA, kaj inĝ. Petăr Todorov, estrarano de UEA pri aplikado de Esperanto en la faka agado, malfermis la Simpozion. Oni akceptis la laborprogramon

kaj elektis prezidantojn de la kunsidoj: inĝ. P. Todorov — Bulgario, Léo De Bruyne — Belgio, s-ino Maria Pontika — Greklando, mag. A. Grezebowski — Pollando kaj s-ro G. Maertens — por la lasta, ferma kunsido.

Sekvis interesaj raportoj pri la ĝisnunaj spertoj, sukcesoj, malfacilaĵoj kaj planoj por penetro de Esperanto en la internacian turismon en diversaj landoj.

Andrzej Pettyn el la Pola Radio faris modelan lecionon pri instruado de Esperanto en la sfero de turismo.

Dum la simpozio estis ellaboritaj tri ĉefaj dokumentoj: projekto-rezolucio por la Sesa Sesio de la Generala Asembleo de MTO, telegramo al la Asembleo kaj alvoko al ĉiuj landaj asocioj kaj ceteraj Esperanto-organizaĵoj, kiujn ni publikigas aparte.

La prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens verŝajne plej trafte formulis la celojn de la simpozio:

„Mi konscias, ke la tuja celo de la simpozio estis starigi kontaktojn kun la Asembleo de MTO. Sed fakte la esenco de tiu simpozio estis multe pli ampleksa, en tiu senco, ke ni devas kunordigi la diversajn instancojn, la diversajn aranĝojn kaj iniciatojn, kiuj okazas dise en la Esperanto-komunumo! . . . Mi esperas kaj mi certas, ke vi daŭrigos vian laboron, kiam vi revenos hejmen per la morala apogo de tiu simpozio, per multe pli da sperto kaj multe pli da entuziasmo!“

Enkadre de la simpozio estis oficiala akcepto ĉe la vicurbestro de urbo Smoljan k-do Monev por ĉiuj partoprenantoj en la simpozio. Ili donacis al la gastiganto vitran pokalon kun inkrustita dediĉo en Esperanto kaj en bulgara lingvo. La prezidanto de UEA s-ro Maertens, akceptita de la urbestro de Smoljan k-do Luizov, donacis al li la Esperantan Antologion, emfa-

zante la simbolecon — ĝi estas kompilita en Britio, kompostita en Belgio, presita en Ĉinio kaj entenas la verkojn de aŭtoroj el centoj da landoj! K-do Luizov esprimis la opinion, ke IEK-Pisanica kaj la esperantistoj vere kontribuas por vigligo de la turismo kaj de la turisma informado en internacia skalo. S-ron Maertens intervjuis korespondanto de la Bulgara Telegrafa Agentejo (BTA) kaj aliaj ĵurnalistoj.

La bulgaraj gazetaro, radio kaj televido ĝustatempe informis pri la simpozio en Pisanica.

Radio Sofio elsendis intervjuon kun s-ro Maertens, kaj unu tagon pli frue la Bulgara Televido menciis pri la komenco de la Internacia Simpozio pri Turismo.

Dum la lastaj du tagoj la Simpozio pri Turismo kunsidis en Sofio. La streĉiteco kaj la klopodoj estis vere tre grandaj. Ĉiuj strebis kontribui por la akcepto de la projekto-rezolucio flanke de la Generala Asembleo de MTO.

Malgraŭ la tre bone preparita grundo, malgraŭ ĉiuj penoj kaj klopodoj flanke de la belga kaj pola delegitaroj ĉe-kape kun ministroj Alfred Ameal kaj Jan Ciszowski kaj de la oficialaj partoprenantoj en MTO G. C. Fighiera, M. Lengyel, Coszina, de Bulgara Esperantista Asocio kaj de BATO, la preparita fare de la simpozio en Pisanica Rezolucio ne estis inkludita en la dokumentaron de la Generala Asembleo de MTO kaj ne eszis traktita, sekve, do, neakceptita!...

Tamen ni ne malesperu! Kontraŭe — ni daŭ-



Partoprenintoj en la Simpozio

rigos la batalon! Post du jaroj en Hispanio dum la Jubilea Jaro, utiligante la akiritajn spertojn kaj povojn, kontaktojn kaj favorajn amikecojn, ni plu klopodos por nobla rekono, por paco kaj interkompreniĝo!

Inĝ. Petăr TODOROV

Projekto

REZOLUCIO

Favore al la aplikado de Esperanto en la internacia turismo, akceptita de la Generala Asembleo de la monda turisma organizajo, okazinta en Sofio, Bulgario, de la 17-a ĝis 27-a de septembro 1985

La Generala Asembleo de la Monda Turisma Organizaĵo, **memorigante** la punkton de **parto „B“** de la Manila Deklaracio pri la monda turismo, akceptita de la Monda Konferenco pri Turismo okazinta en Manilo, Filipinoj, de la 27-a de septembro ĝis la 10-a de oktobro 1980, en kiu estas substrekitaj la graveco de la scio de lingvoj, precipe de tiuj kun universala destino, kia estas Esperanto, por antaŭenigo de la turisma konscio cele al plifaciligado de la kontaktoj inter turistoj, loĝantoj de la turistaj lokoj kaj oficistoj en la turismaj agentejoj;

Notas la rezultojn atingitajn sur la kampo de utiligo de Esperanto en la sfero de internacia turismo fare de vojaĝoficejoj kaj turismaj organizaĵoj en pluraj ŝtatoj-membroj kaj aparte la konsiderindajn rezultojn en la aplikado de Esperanto tiukampe, kiujn atingis la Internacia Esperanto-Asocio „Monda Turismo“;

Rekonas, ke Esperanto kiel neŭtrala inter-

nacia lingvo, kies centjariĝo estos celebrata en 1987, povas servi por la evoluigo de la internacia turismo;

Invitas la ŝtatojn-membrojn instigi la instruadon de Esperanto speciale en la lernejoj kaj aliaj edukaj institucioj kaj trejni profesiajn kadrojn por la internacia turismo;

Rekomendas al la turismaj entreprenoj kaj organizaĵoj de internacia turismo eldoni informilojn, prospektojn, gvidlibrojn, afiŝojn, filmojn k. s. en Esperanto, uzadi Esperanton en sia korespondado, kio kontribuos al la internacia amikeco, fido kaj paca kunvivado;

Komisias al la ĝenerala sekretario de MTO sekvi la evoluon en la uzado de Esperanto sur la kampo de la internacia turismo kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio — Internacia Neregistara Organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO, kies rolo estas kunordigi la antaŭenigon de la internacia lingvo Esperanto.

al ĉiuj Landaj Esperanto-Asocioj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj

La Internacia Simpozio pri Esperanto kaj Turismo, okazinta de la 11-a ĝis la 16-a de septembro 1985 en IEK-Pisanina, Bulgario, organizita de Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Asocio „Monda Turismo“ kaj Bulgara Esperantista Asocio (BEA), kun partoprenantoj el Belgio, Bulgario, Greklando, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, Sovet-Unio kaj Svedio, konstatas ke:

- La internacia turismo rapide evoluas, atinginte jam pli ol 300 milionojn da vojaĝantoj jare;
- En la internacia turismo la lingvaj baroj inter la popoloj estas aparte akre sentebaj kaj malhelpas levigon de la turisma nivelo;
- La internacia lingvo Esperanto povas ludi tre gravan rolon en la internacia turismo. Pli vasta utiligo de Esperanto en tiu ĉi sfero servus ne nur al dis-

volvo de la turismo, sed ankaŭ al altigo de ĝia prestiĝo kaj ties disvastigo.

Pro tio la simpozio turnas sin al ĉiuj Landaj Esperanto-Asocioj kaj organizaĵoj kun jenaj proponoj:

- Fondi komisionon, sekcion, fakon aŭ alian organon aŭ instancon, kiu okupiĝu pri aplikado kaj disvastigo de Esperanto en la turismo kunlabore kun vojaĝoficejoj, eldonejoj, turistaj organizaĵoj k. a.;
- Mem organizi internaciajn aranĝojn por esperantistoj kaj turismajn aranĝojn, servantaj al popularigo de Esperanto inter neesperantistoj;
- Kunlabori kaj apogi la aktivadon de la Internacia Asocio „Monda Turismo“.

14. 09. 1985

De la Simpozio

TELEGRAMO

Al la Ĝenerala Asembleo de MTO
Pere de la Ĝenerala Sekretario s-ro Lonati

Estimata Ĝenerala Sekretario,

En la nomo de la partoprenantoj el 11 landoj en la Internacia Simpozio pri temo „Lingvaj obstakloj al la libera evoluo de la turismo“, organizita de Universala Esperanto-Asocio (UEA) — en konsultaj rilatoj kun UNESKO, de la Internacia Organizo de Esperantistoj-Turistoj (IPET) kaj de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), okazinta en la Internacia Esperanto-Kursejo en v. Pisana apud u. Smoljan, Bulgario (11—16. IX.1985), ni sendas plej korajn salutojn al la partoprenantoj en la VI Sesio de la Ĝenerala Asembleo de MTO kaj bondeziras utilan kaj fruktodonan laboron por disfloro de la internacia turismo en mondo sen militoj, mondo de internacia kunlaborado kaj reciproka fido.

Viaj noblaj ideoj kaj celoj estas tre proksimaj al la idealoj de la monda Esperanto-movado, kies centjarigon ni celebros post du jaroj.

Ni subtenas vian agadon energie kaj organizite per la eblecoj de la internacia lingvo Esperanto.

Tiuj eblecoj povus konsiderinde plivastigi, se MTO donus al ni sisteman kaj daŭran apogon por plua evoluo de la internacia turismo, aplikante ankaŭ Esperanton paralele kun la oficialaj lingvoj de MTO.

Por UEA:
Ing. PETAR TODOROV
Por IOET:
LEO DE BRUYNE
Por BEA:
ĤRISTO GOROV

„BULGARA ESPERANTISTO“

MONATA ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

- Unu el la plej malnovaj E-revuoj en la mondo — fondita en 1919
- Aktualaj problemoj de la E-movado en Bulgario kaj en aliaj landoj
- Libera tribuno de la leganto

Jarabono por 1986: por Bulgario — 2,90 lv.
por socialismaj landoj — 5,42 lv.
por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90

Ne prokrastu fari vian abonon por 1986! Lasta limtempo — 10-a de decembro 1985

Abonu tuj pere de REP. La eldonkvanto estas limigita!

Esperantaj societoj, esperantaj aktivuloj — ni nepre plenumu la decidon de la 41-a kongreso de BEA: ĉiu esperantisto — abonanto de „Bulgara Esperantisto“.

LA REDAKCIO

KIK — SPERTOJ KAJ INSTRUOJ

La ĉi-jara Konstanta Internacia Kvalifikejo (K.I.K. '85), kiu okazis de la 2-a ĝis la 10-a de septembro j.k. en la Internacia Esperanto-Kursejo en v. Pisanica, distrikto de Smoljan, pasis sub hungara „regado“. Rektoro estis Tibor Vaskó, ĝenerala sekretario de Hungara Esperanto-Asocio, vic-rektoroj—Oszkar Princz, organiza sekretario de HEA, kaj Dončo Hitrov—ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“. Partoprenis E-aktivuloj el Sovet-Unio (3), Hungario (7), ĈSSR (7), Rumanio (1), Bulgario (8).

La programo inkluzivis 22 prelegojn — tre variajn laŭteme. Se ni volus ĝeneraligi la temaron, tio estas unuavice historio de la Internacia Lingvo kaj ĝia evoluo, historio de la E-movado, precipe en Hungario kaj Bulgario, interlingvistikaj problemoj, interŝanĝo de organiza sperto, la problemoj pri konservado de la paco kaj pri Mondpaca Esperanto Movado (MEM). Prelegis elstaraj agantoj de la hungara kaj bulgara E-movadoj: d-ro Imré Péthes — prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM, Tibor Vaskó, Oszkar Princz, Dončo Hitrov, Kunčo Válev — lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato, Marin Băcev — ĉefmetodikisto ĉe BEA, Jordan Angelov — prezidanto de DE de BEA en Plovdiv.

La lektoroj montris altnivelajn sciojn pri la traktataj problemoj, lingvokononj kaj majstrecon klarigi en scienc-populara formo gravajn detalojn rilate la starigitajn far la gekursanoj demandojn. Tibor Vaskó tre lerte kaj interese gvidis la prelegojn, kiuj okazis ĉiutage ĝis tagmezo en la belege aranĝita konferencsalono de IEK.

Kvankam la lingva nivelo de la gekursanoj estis malsama, ĉiuj laŭpove starigis interesajn demandojn, dividis propran organizan sperton.

La ekskursoj al Smoljan, Pamporovo, montopinto Snežanka kun la televida turo, vilaĝo Siroka Laka — rezervejo de tipe rodopa arkitekturo kaj al aliaj vidindaĵoj en la regiono de IEK multe kontribuis por ekkono fare de la gekursanoj de tiu mirinde bela parto de Bulgario. Tiel oni pli intime konatiĝis kaj amikiĝis, kio same estas grava eco de KIK.

Ne ĉiuj partoprenintoj en la ĉi-jara KIK estis membroj de gvidorganoj de siaj landaj E-asocioj — la plimulto el ili mem pagis sian restadon. Aliflanke tio ja montras la intereson al KIK, kiu bedaŭrinde ankoraŭ ne estas sufiĉe populara en la E-medioj en niaj frataj socialismaj landoj. La organizantoj kaj la dommastroj de KIK devas fari ankoraŭ multon por pli vaste kaj dece diskonigi ĝiajn programojn kaj ĝian utilan kontribuon por plialtigo de konoj kaj spertoj de la partoprenantoj.

Dank' al la iniciato de la rektoro de KIK Tibor Vaskó, laŭ tre originala maniero estis efektivigita la ekzamenado de la gekursanoj ĉe la fino de la programo. La rezultoj estis sendube kontentigaj, kion substrekiĝis ankaŭ li mem ĉe la solena enmanigo de diplomoj kaj donacoj al la ekzamenitoj.

Jen kelkaj opinioj de partoprenantoj en KIK' 85:

OSZKAR PRINCZ:

— Miaopinie la ĉi-jara seminario pri kvalifikado ĝenerale realigis siajn celojn. La prelegoj, senescepte, estis je alta profesia nivelo. Estonte estus bone, se oni aŭskultus ankaŭ prelegojn pri oratorado kaj lernus E-kantojn. Pli bone unu tuttaga ekskurso ol du duontagaj, ĉefe pro tio, ke ĉiuj estis en la sama regiono. Necesa estas anticipa dissendo de la planita programo, por ke oni pli dece sin preparu antaŭ ol alveturi Bulgarijon. En la vesperaj distraĵoj programoj mankis projekciado de esperantaj filmoj kaj de interesaj lumbildoj, samkiel esperantologiaj prezentaĵoj. Necesas pli granda varieto de kuiraĵoj, tipe bulgaraj.

BERT SCHUMANN, GDR:

— La partoprenantoj estis nesufiĉe zorgeme elektitaj — kelkaj estis preskaŭ komencantoj. KIK-anoj devas minimume flue paroli per simplaj frazoj. Tre ofte estis raportite pri la historio, estis cititaj nomoj, faktoj, sed malmulte estis donitaj rektaj konsiloj al la ne-aktivuloj. Prelegoj de 45 minutoj tro longas — prefere oni prelegu nur parton de la temo kaj poste — dum diskutado kaj demandoj — efektiviĝu la postaj partoj. Estu demandoj far la prelegantoj: „Kiel vi farus tion? Kial ne, ekzemple, tiel, ktp. Tio nepre vekus interesiĝon ĉe la aŭskultantoj. Ĝenerale la maniero de la kurso taŭgas kaj atingas siajn celojn. Dum KIK oni pli ofte konversaciis pri sperto, konsiloj, varbado, instruado, ktp.

JAN REPA, Ĉeĥio:

— Partopreninte en KIK, ni povis ne nur plialtigi niajn konojn pri Esperanto-problemoj, sed ankaŭ dum la ekskursoj ekkoni almenaŭ parteton de Bulgario, kiun mi jam multe amas. Plezure mi helpis al la programo por la solenaĵo lige kun la nacia festo de niaj bulgaraj amikoj — la 9-a de Septembro. Por mi la partopreno en KIK estis vera dektaga festo en intima esperantista etoso.

AUGUSTIN ĈAMBAL, Slovakio:

— La gvidantaro de KIK tre zorgeme preparis la programon, kiu estis tre varia. Eruditaj kaj spertaj fakuloj prelegis alt niveloj pri ege interesaj temoj. Ni ĉiuj forveturas hejmen pliriĉigitaj per novaj konoj pri la historio de la E-movado en mondaj kadroj kaj pri apartaj lingvoproblemoj! Dum la ekskursoj mi vidis pitoreskajn prosperantajn urbojn kaj vilaĝojn, historiajn objektojn. Pro ĉio ĉi ni estas tre dankaj al niaj bulgaraj amikoj.

Estos necese, ke la organizantoj de estontaj seminarioj de KIK pristudu ĉiujn justajn rimarkigojn kaj proponojn de la partoprenintoj en ties ĉi-jara sesio, por ke tiu specifa arango por kvalifikado de E-aktivuloj el la socialismaj landoj evoluu ĉiam pli sukcese kaj fruktodone kaj estiĝu vera lernejo por kadruloj de nia movado.

Radi BANĈEVSKI

„NE ESTAS DU BULGARIOJ!...”

(Daŭrigo de p. II)

matene, la 6-an de septembro, la taĉmento de Goljamo Konare trapasas la ponton sur Marica. Al ĝi aliĝas la artilerianoj gardantaj la ponton. Solene sonoras sonorilegoj, en la stratoj oni krias: „For Orienta Rumelio! Ne estas du Bulgarioj! Vivu la Unuiĝo!” Ĉiuj direktiĝas al la Rezidejo de la guberniestro Gavril Krâstevič — la plej supera reprezentanto de la sultana povo. La roto de majoro Rajĉo Nikolov, gardpostenanta en la Rezidejo, anstataŭ pafi kontraŭ la ribelintojn, tuj miksiĝas kun ili. La dejoranta ĉefserĝento transdonas al Rajĉo Nikolov la ŝosilojn. La guberniestro Gavril Krâstevič, nomata paŝao, estas arestita. Tiu akto estas la komenco de la longe revata Unuiĝo. La urbo vekiĝas pro la ĝojkrioj de la jubilanta popolo. La unuaj sunradioj lumigas la bulgaran standardon flirtantan sur la loko de alia, fremda simbolo. Estas kreita provizora registaro, kiu malpermesas ĉiujn perfertojn:

„Nia celo ne estas buĉi kaj pendigi senkulpajn homojn, nia celo estas la sankta unuiĝo kun niaj nordaj fratoj!” Kaj efektive, estas donita nur unu, kvankam tre kara viktimo — pereas kapitano Rajĉo Nikolov.

La informo pri la Unuiĝo atingas Princlandon Bulgario. En Sofio kaj en la aliaj urboj la popolo entuziasme akceptas la realigitan eventon.

En la nomo de la provizora registaro ĝia prezidanto d-ro Stranski informas princon Aleksandro Batemberg, kiu subskribas en Târnovo la proklamon de la Unuiĝo.

Tiel la bulgara popolo, sola, sen fremda helpo, armita per la plej forta armilo — patriotismo kaj kredo je la venko, unuiĝis Bulgarion, konservis ĝin kaj per sia abnegacio altigis ĝian nomon.

Angel ANGELOV
Veselina KURTEVA

Gravega historia evento

Pri la ribelo de fratoj Asen kaj Petâr — rimarkinda politika kaj milita akto en la mezepoka bulgara historio, valorajn informojn lasis al ni la bizanca kronikisto Nikita Akominat-Honijat. El aliaj fontoj kaj malnovaj legendoj ni ĉerpas nur fragmentajn informojn, kiuj en pli-malpli alta grado helpas al ni konstati iujn detalojn. Sed la fakto mem estas nekontestebla. Ĝi estas akceptita kun diversa grado de miro kaj admiro ne nur de la Bizanca Imperio, sed ankaŭ de tiama Eŭropo, ĉar la krucistaj militiroj ebligis ĉiuflikan enpenetron en la problemojn de la landoj en la regiono de Balkanmontaro. Tiu ĉi fakto estas la sukceso mem de la ribelo — afero malfacila dum ĉiuj epokoj. Kaj la cirkonstanco, ke ĝi sukcesis kontraŭ tia potenca imperio, ege pliigas ĝian valoron. Krome, ĝi ne estas iniciato de aparta kasto aŭ klaso, kiu celas siajn proprajn interesojn, sed spontana manifestiĝo de la tuta popolo. Tion la samtempuloj aparte notas. Feliĉa estas ankaŭ la koincido de la popola impeto kun la talenta gvidado de ambaŭ gvidantoj — la fratoj Asen kaj Petâr. Ĉiuj historiaj fontoj, kaj precipe Akominat mem atestas, ke Asen estis eksterordinare talenta militestro kaj diplomato. Renversi la jugon de militforto, kiu havis kiel sian celon la neniigon de la bulgara ŝtato, estis tasko nek facila, nek facile solvebla. Oni devis venki multajn obstaklojn, por konservi ne nur la sukcesan komencon de la ribelo, sed ankaŭ stabiligi la fundamentojn de la ŝtato, tiel ke dum la regado de la grandaj caroj Kalo-

jan kaj Ivan Asen II, ĝi atingu la suprojn de sia potenco. Do la komenco, proklamita en novembro 1185 antaŭ la muroj de la preĝejo Sankta Dimitro, estis anticipe tre bone preparita, post kio oni devis heroe defendi la permilititan sendependecon. La plej karaj viktimoj de tiu konsekvenco kaj firma pozicio estas la inspirantoj mem kaj popolaj gvidantoj, kiuj pereas por savi la dignon de sia popolo.

Plej grava trajto de la popola entuziasmo, kion ankaŭ la kronikisto Akominat konfesas, estas la ligo de la bulgara popolo kun la historio, la rememoroj pri la iama heroo pasinteco. Mem la fratoj Asen kaj Petâr devenas el malnova bulgara gento, ne forgesinta la pasintan gloron. Tial la unua militiro de ilia armeo estas al la malnova ĉefurbo Preslav. Ĝi estas ne strategia, sed precipe politika celo — akto de kontinueco kaj de restarigo de la bulgaraj politikaj tradicioj. Ne estas hazardo, ke pli malfrue, en siaj leteroj al papo Inokentio III, Kalojan kun pravigebla fiero skribos, ke liaj prauloj estas Simeon, Petâr kaj Samuil (Simeonis, Petri et Samuelis, progenitorum meorum et ceterorum omnium imperatorum Bulgarorum).

Tio fakte estas la grandaj naciaj valoraj, pro kiuj antaŭ ok jarcentoj la bulgaroj fiere levis siajn glavojn kaj ne nur restarigis la pasintan majestecon de la bulgara ŝtato, sed ankaŭ starigis la fundamentojn de iu el la plej brilaj periodoj en nia nacia historio.

Angel ANGELOV

FIDELA AL NOBLAJ IDEALOJ



Naskita en la Balkanmontara vilaĝo Belica la 10-an de septembro 1915, Hristo Manolov tre frue spertas la sorton de promilita orfo kaj la penigan vivon de la malriĉuloj. Tio difinas lian estontan socian konduton. En Polski Trâmbeŝ li prezidas la lernantan abstinenculan societon kaj pro sia kontraŭfasiŝisma eldiro estas kruele batita en la policejo. En la knaba gimnazio de Veliko Târnovo (1932—1934) Manolov aktivas en la gelernanta E-societo „Flamo“. Kaj dum sia tuta vivo li restas fidela al la noblaj E-idealaj.

Kiel instruisto en vilaĝo Novgrad (apud Sviŝtov) dum la periodo 1937—1944 li gvidas E-kurson por komsomolanoj, malpermesita de la polico, tamen ĉesas nek lia vigla internacia korespondado, nek lia aparteno al BEA. En la sama loĝloko li aktivas kiel gvidanto de la kooperativo kaj kiel entuziasma kultura aganto — ĉiam man' en mane kun la progresemaĵoj, ĉiam sub la akraj atakoj de la reakciuloj.

Dum tiu antaŭmilita periodo rimarkindaj kaj sufiĉe kuraĝaj estas la kontribuoj de Hristo Manolov en multaj ĵurnaloj kaj revuoj: „Trezva mladej“ (Sobra Junularo), „Ustrem“ (Impeto), „Obrazovanie“ (Edukado), „Kooperativno Zname“ (Kooperativa Flago), „Uĉitel“ (Instruisto), „Obŝtestvena tribuna“ (Socia Tribuno), kiu aperas en u. Sviŝtov ka. Tie li skribas pri la paciga rolo de Esperanto, kontraŭ la alproksimiĝanta milito, pri la noveorganizitaj unuaj agrikulturaj kooperativoj, pri la socia devo de la progresema junularo en tiu epoko.

Post la Naŭa de Septembro 1944 li estas alvokita labori en Polski Trâmbeŝ. Du jarojn post la Liberiĝo tie funkcias de li gvidata E-

kurso. Poste, kune kun Stefan Dimitrov k. a. samideanoj en la urbo estas fondita E-societo. Kiel gimnazia direktoro jam en 1957 Hristo Manolov enkondukas la fakultativan instruadon de la Internacia Lingvo kaj la tradicio ĝis nun restas neŝanĝita. Sub la redaktado de tiu fidela esperantisto dum kelkaj jaroj en Polski Trâmbeŝ estas presata la internacia gelernanta E-gazeto „Grajnoj de Vento“. Kun lia neparta partopreno kaj senlaca iniciatemo la urba E-societo „Hristo Kozlev“ marŝas antaŭen (kursoj kaj rondoj, klubaj korespondado kun pli ol 30 landoj, ekspozicioj, alilandaj ekskursoj, aktiva partopreno en la urbaj iniciativoj, ĉiam kune kun la loka porpaca komitato kaj aliaj amasorganizaĵoj. . .)

Nun nia 70-jara jubileulo daŭre aktivas sur la Esperanto-kampo—membro de la loka, distrikta kaj enlanda estraro de BEA kaj de la Internacia Komitato de MEM. Li gvidas kursojn, propagandas, organizas, estas dezirata preleganto, aktivo de la loka kaj distrikta porpacaj komitatoj, kunlaboranto de la distrikta gazeto „Borba“. Li senlace partoprenas ĉiujn iniciatojn, kiuj kondukas niajn samurbanojn al la hela, feliĉa kaj paca estonto.

Krăstinka DIMITROVA

NIA SOCIETA PREZIDANTO



Jordan Iliev Atanasov, prezidanto de la E-societo „Fratego“ en vilaĝo Polsko Kosovo, distrikto de Ruse, estas naskita en la vilaĝo la 24-an de julio 1915. Dum la lernojaro 1934—1935, kiam li estis en la oka klaso de la knaba gimnazio en Veliko Târnovo, li lernis Esperanton en la gelernanta kurso de la instruisto-pentristo Ivan Vâlcanov. Ĝin li finis kune kun Vârban K. Penĉev kaj Minĉo F. Alev.

Kiel studento la juna esperantisto komencis korespondi kun samideanoj el Pollando, Fran-

cio, Hungario, Japanio ka. Por unua fojo li partoprenis la XIII bulgaran E-kongreson en Veliko Târnovo — 1936.

Estante instruisto en la najbara de Polso Kosovo vilaĝo Pejčinovo — apud u. Bjala, Jordan Atanasov aĉetis la lernolibron de Asen Grigorov kaj komencis gvidi la unuan E-kurson en Polso Kosovo kaj Pejčinovo.

En 1938 la juna esperantisto alvenis per biciklo en Sevlievo, kie okazis la XXV bulgara E-kongreso kaj tie li konatiĝis kun la elstara instruisto-esperantisto Simeon Hesapčiev.

En 1942 Atanasov estis sekretario ĉe la lerneja inspekcio kaj poste vic-inspektoro en Bjala. Tamen, kiel progresema instruisto, li estis eksigita.

De 1960 ĝis 1965 Jordan Atanasov estis ins-

truisto en P. Kosovo kaj gvidis senpage Esperanto-kurson por gelernantoj. Tiam li korespondis kun s-no Ivan Sarafov.

Post sia translokiĝo en urbon Svoge li organizis du kursojn kaj fondis E-societon „Amikeco“.

De tempo al tempo J. Atanasov kontribuis per artikoloj al revuo „BE“.

En 1975 li pensiigis kaj revenis en Polso Kosovo. Jam kvindek jarojn li laboras kaj propagandas Esperanton.

Al la jubileulo kaj nia societa prezidanto ni bondeziras sanon, longan vivon kaj pluan E-aktivadon!

Lilia IVANOVA

BULGARA ANTOLOGIO

Antaŭ 60 jaroj aperis *Bulgara Antologio* (1925) kaj fakte ĝi estas la unua antologio de belliteraturo en Esperanto-traduko, ĉar la *Pola Antologio* (fakte antologieto), kompilita de Kazimir' Bein (1906) estas konsiderata nur kiel ĝermo de antologio. Iom poste en la sama 1925 jaro aperis *Kataluna Antologio*. En 1928 sekvis *Belga Antologio* (en du volumoj), estona (1932), hungara (1933), ĉeĥoslovaka, sveda, itala, hispana k. a. belliteraturaj antologioj.

Bulgara Antologio estas komuna faro de la bulgara esperantistaro kaj precipe de tiuj literaturemaj bulgaraj esperantistoj, kiuj elektis, tradukis kaj sukcesis aperigi siajn versiojn en bulgara kaj eksterlanda esperantista gazetaro (1903—1924). Gravis ankaŭ la gesto de tiuj, kiuj abonis la antologion, antaŭpagante kun rabato. La movilo de la tuta entrepreno tamen estis Ivan Haralampiev Krâstanov (1890—1966) — I.H.K., kiu sin engaĝis publike kompili kaj eldoni la *Bulgaran Antologion*. Kaj li sukcesis.

Granda estas la merito de Krâstanov, ke li sin engaĝis kun financa elspezo por pagi la koston de la eldono kaj li mem ekspedis la menditajn ekzemplerojn al la abonantoj kaj aĉetantoj. Li vendis ĝin dum 41 jaroj. Post lia morto restis nur deko da ekzempleroj.

Krâstanov kompilis la verkon, sed lia kontribuo en tiu rilato ne estis tute memstara. Li fakte kolektis ĉion (poemojn kaj prozverkojn), kion aliaj tradukis kaj aperigis. En la proceso de laboro la kompilanto (kunmetanto) rimarkis, ke mankas tradukoj de iuj poetoj kaj verkistoj. Li elektis el ties verkaro konvenajn pecojn kaj la prozajn li mem tradukis. La poeziaĵojn tamen li ne povis traduki, tial li sendis al Kolomano Kalocsay prozan tradukon de tiuj verkoj kun detala informo pri la metriko. El tiu materialo K. Kalocsay faris la versajn tradu-

kojn de dek unu poeziaĵoj: „Arbaro mia, bel-arbar“ de Ljuben Karavelov; „Amo necesas“ kaj „La kanto de la cejano“ de Ivan Vazov; „Nenio daŭras“ kaj „Demando de ciferoj“ de Stojan Miĥajlovski; „Soneto“ de Konstantin Veliĉkov; „Ni“ de Stilian Ĉilingirov; „Magiisto“ kaj „En la naskiĝa arbaro“ de Teodor Trajanov; „Infanoj de l' naturo“ de Jordan Kovaĉev kaj „Ciganoj“ de Nikolaj Rakitin.

Ĉiuj ceteraj poemoj en la *Bulgara Antologio* estas tradukitaj de bulgaraj esperantistoj. Krâstanov ne tradukis poemojn. Kiel kompilinto li faris gravan preterlasojn. Li ne mencias la nomojn de la tradukistoj, sed tio estas facile konstatebla post komparo de la tekstoj en la antologio kun la tekstoj aperintaj en la gazetaro.

Dum 25 jaroj (1925—1949). *Bulgara Antologio* estis multe laŭdita pro la korekta kaj bela stilo de la tradukoj. Tiun perfektecon Krâstanov atingis per sia internacia metodo de redaktado. Li disponigis la prozajn tekstojn al kelkaj eksterlandanoj, kiuj tralegis la materialojn kaj konsilis pri plibonigoj.

Ivan Krâstanov faris rimarkindan organizon, selektan, fincan kaj propagandan laboron por donaci al la mondo la libron *Bulgara Antologio*. Jam en 1933 el tiu verko estis faritaj tradukoj de Vazov-poemoj en katalunan lingvon. En 1940 grandparte la antologio estis tradukita en ĉinan lingvon. Oni ankaŭ ne studis la influon kaj la utilecon de *Bulgara Antologio*, sed la supraj du ekzemploj parolas pri seriozeco kaj fekundeco.

Post la venko de socialismo en nia lando estis eldonitaj: „Bulgara Prozo“, kolekto de noveloj; „Septembro estiĝos Majo“, antologio el verkoj dediĉitaj al la Kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo (1923), eldonita en 1983, kaj nun estas preta por presado „Antologio de Moderna Bulgara Poezio kaj Prozo“.

Canko MURGIN

VIZITO DE JAPANAJ PACAMIKOJ

La nomo de Georgi Dimitrov en la Lando de Leviĝanta Suno • La japana E-movado antaŭ la Dua Mondmilito

Laŭ invito de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“ septembre j. k. en Bulgario gastis du veteranoj de la japana pacmovado: Hideo Fuĝii kaj Takenori Takaragi. En daŭro de du monatoj — dum majo kaj junio 1936, Fuĝii kaj la pli juna frato de Takenori — la esperantisto Jutaka Takaragi (mortigita en 1943 pro kontraŭfaŝisma agado) — streĉe laborante, tradukis en japanan lingvon la raporton de Georgi Dimitrov „La ofensivo de la faŝismo kaj la taskoj de la Komunisto Internacio en la batalo por unueco de la laborista klaso kontraŭ la faŝismo“, prezentitan antaŭ la VII kongreso de la Komunisto Internacio la 2-an de aŭgusto 1935.

Tiutempe Takenori Takaragi estis prezidanto de la esperantista societo en Osaka kaj, kune kun sia frato, per la Internacia Lingvo aktive batalis kontraŭ la faŝismo kaj milito. Iliaj progresemaj mondkonceptoj trovis esprimon sur la paĝoj de la eldonata de ili revuo „Frato“, kiu aperadis dum 1936. Ĝi havis eldonkvanton de 1000 ekzempleroj, 100 el kiuj estis destinitaj por eksterlando. La artikoloj en tiu periodaĵo estis en japana lingvo kaj Esperanto kaj en ĝi estis publikigitaj adresoj de esperantistoj el alilando.

Pro sia progresema agado Fuĝii kaj la du fratoj Takaragi estis enprizonigitaj. Post eliro el la malliberejo, malgraŭ liaj mondkonceptoj, Hideo Fuĝii estas sendita en la armeon. Tie li propagandas kontraŭmilitajn kaj kontraŭfaŝismajn ideojn inter la soldatoj kaj ne nur kontaktigas ilin kun nordĉinaj komunistoj kaj partizanoj, sed subtenas tiun ligon.

Kiel rakontas s-ro Takaragi, dum la antaŭmilitaj jaroj ĉiuj elstaraj



De maldekstre dekstren: Hideo Fuĝii, Vassja Cvetkova kaj Takenori Takaragi

japanaj esperantistoj estis en malliberejoj. En Tokio, escepte de la urba regiono Kansaj, la E-organizaĵo estis neniigita. Tial la raporto de G. Dimitrov estis sendita en Osaka, al la junaj fratoj Takaragi (tiam Takenori havis 25 jarojn kaj Jutaka — 18). La raporton sendis Karl Jonega — amerika komunisto japandevena. Li plenumis diversajn taskojn de internacia karaktero, kiujn donis al li Sandzo Nosaka — kunlaboranto de G. Dimitrov en la Komunisto Internacio kaj gvidanto de ĝia japana buroo en Los Anĝeleso. En Osaka alvenis du ekzempleroj de la raporto, la unua en Esperanto, presita en Harkovo, kaj la alia en angla lingvo. Jutaka Takaragi kaj Hideo Fuĝii faras la tradukojn el ambaŭ lingvoj kaj poste ili komparis tiujn tradukojn. La 1-an de aŭgusto 1936, unu jaron post tralego de la raporto antaŭ la VII Kongreso de la Komunisto Internacio, aperas stencilpresita ankaŭ ĝia japanlingva traduko.

Ambaŭ japanaj gastoj dum renkontiĝo kun la estraro de la Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“, donacis al ĝi la unikan konservigitan originalon de la unua japanlingva varianto de la raporto.

La resonado de la raporto de Dimitrov inter la progresemaj japanaj medioj tiutempe estis granda. Nur du ekzempleroj: En la suda havenparto de Osaka, kiu estas ankaŭ granda industria regiono, agis du sindikataj organizoj: „Progresemaj Laboristoj“ kaj „Unueca Sindikato“. Post tralego de la raporto, iliaj estraroj decidis unuigi siajn fortojn por kontraŭmilita kaj kontraŭfaŝisma agado. Tiamaniere en la kadroj de la japana sindikata movado etendas al si manojn per komuna deklaracio la komunisto partio kaj la t. n. social-popola partio, kiu ĉe

sia fondo eĉ estis sur kontraŭkomunistaj pozicioj. Post la aliĝo de Japanio al la triŝtata pakto, ambaŭ partioj estis malpermesitaj.

S-ro Takenori Takaragi estas plenumdirektoro de la Asocio de la Osakaj Industriistoj por Plena Malpermeso de l' Atomarmiloj. Pasintjare aperis lia libro „La juneco de la rezista movado“, en kiu la aŭtoro rakontas pri la progresema agado de fratoj Takaragi kaj pri la traduklaboro super la raporto de Georgi Dimitrov. S-roj Takaragi kaj Fuĝii vizitis la domon-muzeon de G. Dimitrov en v. Kovaĉevci, urbon Pernik kaj aliajn lokojn ligitajn kun la vivo kaj agado de la eminenta aganto de la bulgara kaj internacia revolucia movado.

Pro la granda kontribuo de la japanaj gastoj al la batalo kontraŭ militarismo kaj faŝismo, per dekreto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario ili estis distingitaj per la jubilea medalo „100 jarojn de la naskiĝo de Georgi Dimitrov“, per la Honora Insigno de CK de la Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo, per la Ora Insigno de BEA kaj estis proklamitaj ĝiaj honoraj membroj.

Maria JANKOVA-BOJ AĜIEVA

ESPERANTO EN LA INTERNACIA DANUBA REMADO



La bulgara remad-teamo

Foto D. Poraliev

Jam 30 fojojn turismaj organizaĵoj el FRG, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Bulgario okazigas Internacian Danuban Remadon (IDR). Ĝin ĉiujare partoprenas pli ol 800 personoj el multaj eŭropaj landoj. Ili navigas per boatoj la tutan aŭ parton de la itinero, kiu longas 2082 km. La remado ĉiam komenciĝas de la germana urbo Ingolstadt kaj post 65 tagoj finiĝas en urbo Silistra, Bulgario.

La programo de IDR antaŭvidas 12 ripoztagojn. Dum ili la partoprenantoj ne nur ripozas, sed ankaŭ havas eblecon ekkoni lokajn vidindaĵojn, partoprenas kulturajn aranĝojn kaj efektivas organizitajn aŭ spontanajn renkontigojn kun la apuddanuba loĝantaro.

La organizantoj kaj la partoprenantoj en IDR penas diversmaniere venki la lingvajn obstaklojn, sed ofte la klopodoj ne atingas la deziratajn rezultojn.

Ekde 1984 la Internacia Asocio „Monda Turismo“ komencis plane kaj sisteme agadi, por ke Esperanto estu disvastigata kaj uzata dum tiu ĉi grandioza internacia turista aranĝo. Hungara Esperanto-Asocio pere de sia turisma komisiono dum la 29-a IDR organizis disdonadon de flugfolioj pri Esperanto inter la remantoj.

La ĉi-jaran jubilean danuban remadon partoprenis plej granda nombro da personoj. Inter ili estis 12 geesperantistoj el urbo Levski. Ilia partoprenon organizis kaj financis la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio. Dum 13 tagoj ili remis de urbo Vidin ĝis urbo Silistra — 421 km. Gvidataj de Nikola Nikolov,

viceprezidanto de „Monda Turismo“ kaj Dimităr Poraliev, kapitano de la grupo, la geesperantistoj estis rekonitaj de la organizantoj kiel plej bonaj kaj disciplinaj partoprenantoj.

La ses tendoj de la esperantistoj ĉiam estis starigitaj sur la centra loko de la tendaro. Sur ili oni povis legi surskribon „Esperanto — lingvo internacia“. Ankaŭ en la plej multe vizitataj tendaraj lokoj oni pendigis informtabulon pri Esperanto kaj la remado.

La geesperantistoj-remantoj estis vestitaj en blankaj kotonaj ĉemizetoj, sur kiuj oni povis facile vidi la verdan stelon kaj la vorton „Esperanto“. Al ĉiuj partoprenantoj (pli ol 600) estis disdonita la alvoko de Bulgara Turista Asocio kaj de Bulgara Esperantista Asocio al la remantoj lerni kaj apliki Esperanton dum IDR. Por ke ĝi estu bone komprenata, oni ĝin eldonis en bulgara, germana kaj hungara lingvoj.

En la tendaro starigita apud urbo Nikopol okazis bone organizita renkontiĝo de la remantoj kun 46 geesperantistoj el urboj Pleven, Levski kaj Nikopol. Ĝis noktomezo sonis kantoj, muziko, versaĵoj, ŝercoj. Bulgarajn rondodancojn ludis bulgaraj kaj alilandaj remantoj.

Multaj el la remantoj, precipe tiuj el eksterlando, konfesis ke ili preskaŭ nenion sciis pri Esperanto kaj estas impresitaj de la aktiveco, solidareco, amikemo kaj entuziasmo de la esperantistoj.

La 30-a jubilea Internacia Danuba Remado sukcese finiĝis. La partoprenantoj revenis hejmen bone informitaj pri la ebleco facile interkompreniĝi dum la sekvontaj IDR-oj pere de Esperanto. Devo de la Esperanto-organizaĵoj estas sendadi al la personoj, kiuj ŝatas praktiki akvan turismon, pli da informoj pri Esperanto kaj pri la eblecoj lerni ĝin.

La Turista Sekcio ĉe BEA jam planas en IDR 1986 partopreni denove per grupo, kiu remu de Vieno aŭ de Budapeŝto ĝis Silistra. Ni ĝojos, se al la bulgara grupo aliĝos alilandaj geesperantistoj. Tiamaniere la informado kaj la praktikado de Esperanto en la Internacia Danuba Remado estos pli efika kaj rezultodona.

La dezirantoj ricevi pli da informoj pri IDR kaj pri la Kampanjo „Esperanto en la Internacia Danuba Remado“ sin turnu al: „Monda Turismo“, P. K. 45, BG. 1090—Sofio, Bulgario.

Nia aktiva partopreno en la estontaj IDR certe popularigos niajn lingvon kaj movadon en turistaj medioj, kiuj baraktas kontraŭ lingvaj malfacilaĵoj.

N. ILIEV

La sperto de Gabrovanoj

Nia E-societo „Evtim Apostolov“ estas iom nekutima. Ĝi estas karakteriza per tio, ke ĝi ekzistas aparte, sendepende de la tuturba societo „Verda Torĉo“. Ĉiuj ĝiaj membroj estas laboristoj en la Panprodukta Uzino en Gabrovo. Do, nia societo estas unu el la malmultaj ĉeuzinaj societoj en nia lando.

Kiam en 1980 ni fondis la societon, multaj dubis, ĉu ĝi povos daŭre ekzisti en tia nekutima formo. Sed DE de BEA en Gabrovo kaj la Centra Estraro de BEA vidis en ĝi interesan eksperimenton, aprobis ĝin kaj kuraĝigis nin. Post nelonga tempo ĉiuj konvinkigis, ke tiu „nekutima“ societo ne nur sukcese funkcias, sed eĉ havas multajn avantaĝojn kompare kun la ordinaraĵoj tuturbaj societoj, nome:

— Por ni ne ekzistas problemoj pri salonoj por niaj kunvenoj kaj kursoj, ĉar la ejoj de la uzino estas je nia dispono.

— Ni uzas senpage telefonon, skribmaŝinojn, kancelariajn materialojn kaj ŝparas niajn rimedojn.

— La uzinaj pentristoj kaj la teknikistoj helpas nin senpage kiam ni bezonas prepari afiŝojn, murgazetojn ka.

— Ĉiuj membroj de nia societo havas proksimajn profesiajn interesojn, saman labortempon, ili estas ĉiam kune, interparolas Esperante, parolas pri Esperanto kaj tiel senĉese propagandas nian ligvon inter la laboristoj-neesperantistoj.

— Ĉiujare la direktoro de la Uzino subvencias la societon per certa monsumo ktp.

Jam ekde la unua jaro post la fondiĝo de nia societo ni komencis serĉi kontaktojn kun eksterlandaj esperantistoj, laborantaj en panpro-

duktaj uzinoj, en diversaj landoj de la mondo. Kaj ni sukcesis. Post nelonga tempo ni jam havis korespondantojn-kolegojn en pli ol 20 landoj. . . . Ni interŝanĝis receptojn, teknologiojn kaj aliajn informojn pri la produktado de pano kaj aliaj pastoproduktoj. . . . Tiel ni perfektigas niajn profesiajn konojn. . .

Niaj esperantistoj-inĝenieroj, analizante la ricevitaĵojn per Esperanto katalogojn kaj prospektojn de diversaj pan- kaj pastoproduktaj maŝinoj, venis al interesaj ideoj kaj inventis novan bulgaran maŝinon por produktado de pastofolioj. Tiu maŝino estas pli produktiva kaj pli konvena por la bulgaraj farunspecoj.

En 1984 niaj inĝenieroj per raciigaj ŝanĝoj adaptis la saman maŝinon por produktado de nudelo, kiu estas tre altkvalita kaj serĉata sur la merkato. Nun la tuta lando konsumas pastofoliojn „Gabrovo“ kaj nudelon t. n. „hejman“, produktitaj per niaj maŝinoj.

Pere de nia Esperanto-korespondado ni eksciis ankaŭ pri la ekzisto de Muzeo de la Pano en urbo Ulm (FRG), kaj nia Panprodukta Uzino same organizis nian propran Muzeon de la Pano. Nun ni plu kompletigas kaj riĉigas ĝin per novaj eksponaĵoj. Laŭ disponataj informoj, nia Muzeo de la Pano estas tria en la mondo kaj sola sur la Balkana Duoninsulo.

Ĉion ĉi mi rakontas ne por fanfaroni pri niaj sukcesoj, sed por konvinki vin, ke la uzinaj Esperanto-societoj estas vivipovaj kaj efikaj. Ni proponas al la Centra Estraro de BEA instigi kaj kuraĝigi la fondadon de pliaj similaj societoj en ĉiuj pli grandaj uzinoj kaj entreprenoj en la diversaj urboj de nia lando!

Stefka TOTEVA, Gabrovo,
(El ŝia eldiro antaŭ la 41-a Kongreso de BEA)

ANDRZEJ PETTYN GASTE ĈE NI

Lige kun la Internacia Esperanto-Simpozio pri Turismo, okazinta en IEK-Pisanica en septembro j.k., nian landon vizitis Andrzej Petryn — konata pola aŭtoro de Esperanto-lernolibroj kaj metodikaj instruhelpiloj kaj ĉefredaktoro de la Esperanto-redakcio ĉe Radio „Polonia“.

Post la partopreno en la simpozio A. Petryn vizitis Plovdiv, Pazarĝik, Gabrovo kaj Sofio, kie li prelegis antaŭ esperanta publiko pri E-radioelsendoj, ilustrante siajn lekciojn per sonbendigitaj voĉoj de famaj esperantistoj. En siaj prelegoj la gasto tuŝis ankaŭ problemojn de la metodiko de E-instruado.

En Sofio A. Petryn prelegis antaŭ pli ol 20 E-instruistoj el la ĉefurbo kaj el la distrikto de Sofio. La renkontiĝo okazis en la Junulara Domo de Kulturo „Lilia Karastojanova“. La gasto demonstris kiamaniere oni povas ekparoligi ge-

kursanojn jam en la unua lernohoro kaj kiel krei favoran, amuzan etoson por tiuj, kiuj vizitas la kursojn tuj post laciga labor-tago.

La ĉeestantoj havis eblecon aŭskulti la surbendigitajn voĉojn de L. L. Zamenhof kaj de lia nepo, kio estis vera surprizo kaj unika rarejo.

Post la lekcioj A. Petryn estis afabla dividi kun ni impresojn pri sia vojaĝo tra Bulgario.

— La vizito en via lando estis por mi — li diris — vera ŝoko en la plej bona senco de tiu vorto. Mi tute ne supozis, ke la bulgara Esperanto-movado estas tiom evoluinta kaj posedas tiajn ekonomiajn eblecojn. Forte impresis min la Internacia E-Kursejo en Pisanica. Oni nepre devas vaste diskonigi ĝin al la monda esperantistaro, ĉar ĝi estas vera esperanta trezorejo.

Mariana ELENOVA

Mia fenestro al la mondo

„Kial mi estiĝis esperantisto“ — tio estis mia unua konfeso sur la paĝoj de gazeto „Zarja“ en 1940. Pli malfrue aperis alia, sub la formo de letero: „Kial vi rompis mian fenestron al la mondo?“ Estis komenciĝinta la Dua Mondmilito, kaj ĝi forprenis mian amikinson Joana Lomans el Amsterdamo. La doloro naskis proteston kontraŭ tiuj, kiuj bruligis la urbon, en kiu pereis Joana (pri tio mi eksciis pli malfrue pere de la Internacia Esperantista Unuiĝo en Genevo).

En tiuj jaroj Esperanto estis serioza aliancano denia junulastrebo malkovri la mondon, ekkoni kaj renovigi ĝin. En mia vilaĝo Lozica, distrikto de Pleven, la unuaj esperantistoj estis la ordinaj kamplaboruloj Ljuben Tasev Makaveev, Nikolaj Najdenov Marinčev, ilin sekvis la lernantoj Vladimir Basarov, Asen Vankov kaj multaj aliaj. Eklernis ĝin ankaŭ mi — avide, rapide. . . Sempacienca atendi, ne finlerninte ĉiujn regulojn, mi komencis korespondi kun Norvegio, Danlando, Svedio, Sovet-Unio, Francio, Aŭstralio, Kanado, Jugoslavio, Hungario. . . Ĉiujn miajn modestajn monrimedojn mi elspezis por ekskursoj tra Bulgario kaj por ekspedado de leteroj. Ofte la leterportisto diradis al mi: „Hodiaŭ mi havas leterojn nur por vi. . .“ Al mi skribis junaj kaj maljunaj homoj, oni sendis librojn, albumojn, memoraĵojn. . .

Miaj amikoj estiĝis Sifra Levi el Jambol, Donka Borisova el Ĉirpan, Haim Levi el Dupnica (nun Stanke Dimitrov), Georgi Petrov (pli malfrue mortigita de la polico) kaj Virginia Nikolova Beŝeva-Topalska (ambaŭ el Pleven), Bojan Conev el Bojurluka, Dimitar Minčev el Sviŝtov, Nedjalko Uŝinski el Razgrad, Jordan Stojanov el Drenovec — distrikto de Razgrad, kaj multaj aliaj. . .

Esperanto en mia vilaĝo gajnis plurajn novajn adeptojn. Tial, por viziti la landan kongreson en 1938, el Loznica al Sevlievo piede ekiris Vladimir Basarov, Asen Vankov, Aleksandăr Basarov, Petăr Dačkov, kaj en 1939, por la kongreso en Pleven, en Loznica el Razgrad denove piede venis Nedjalko Uŝinski kaj Jordan Stojanov. Ili tranoktis en mia hejmo, ni iom babilis — pri la vivo ĝenerale kaj pri nia laboro en la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS), pri la rolo de Esperanto en la batalo por paco kaj amikeco inter la popoloj. La sekvan tagon ni ekiris piede el Loznica al Pleven. . .

La kongrestagoj en Pleven por ĉiam restos en mia memoro. Ni renkontiĝis kun malnovaj kaj novaj samideanoj. Tre agrabla estis la eks-

kurso de grupo da esperantistoj en la Skobelev-parko; inter ili estis Cvetan Spasov, Lenko Miŝev, Ljuben kaj Aleksandăr Dunčev, Ivan Vandov, fratoj Kojnakov, Vera Ganeva k. a. En la domo de Krăstju Obretenov okazis nelegala renkontiĝo de komunistoj kaj RMS-anoj, dum kiu oni analizis la rolon kaj agadon de RMS en la amasaj organizaĵoj, junularaj kooperativaj grupoj, abstinencula movado, Esperanto. . .

Neforgeseblaj estas miaj renkontiĝoj kun reprezentantoj de la jugoslaviaj esperantistoj. Mi longe memoris la nomon kaj adreson de unu el ili. Post la Dua Mondmilito, revenante el Hungario, mi serĉis lin en Beogrado. Li estis partizano, post la milito fariĝis profesoro. Unika renkontiĝo, sinceraj interparoloj kaj ĝojo pro la venko super faŝismo!

En 1942 mi estis arestita lige kun la konspiro en la tutarmea komunikada regimento en Sofio. En tiuj pezaj kaj krudaj tagoj de perfido kaj perforto, mia patrino, timante pri mi, forbruligis mian tutan nelegalan literaturon, la leterojn de miaj multnombraj amikoj-esperantistoj el la tuta mondo. . .

Venis nova tempo. Mi okupis diversajn postenojn, poste mi fariĝis ĵurnalisto. Mi havis la feliĉon en la nomo de la Administra Konsilantaro de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj saluti renkontiĝojn de esperantistoj en Veliko Târnovo kaj poste ankaŭ en Pleven. Mi estis fiera, post tiom da jaroj, turni min en Esperanto al tiuj, kiuj daŭrigas sian agadon sur tiu kampo. Kaj mi sentis ĉagrenon, ĉar mi postrestis, ĉesigante miajn multnombrajn perleterajn kontaktojn kun aliaj landoj, ĉar mi perdis ion, kion mi havis, ion tre valoran kaj karan. . .

En miaj rememoroj mi revenas al ĉiuj, kiuj pasis tra malliberejoj, koncentrejoj, partizanaj taĉmentoj, portante en siaj koroj la noblajn idealojn de Esperanto.

Multaj el ili pereis. Sed multaj aliaj restis vivaj, kaj post la venko de nia socialisma revolucio denove renkontiĝis en internaciaj E-kongresoj, interparolis en paca, amika, atmosfero. El Bulgario al diversaj partoj de la mondo forflugas centoj da leteroj de esperantistoj, pacaj heroldoj de nia patrolando.

Tio estas plia konfirmo de la fakto, ke Esperanto estas vivanta lingvo, ke ĝi havas vastan kampon por manifestiĝo, gravan mision plenumendan.

Stojko DANČEV

Montodomo „Esperanto“ jubileas

La bone konata al bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝamonto fariĝis jam 25-jara. Lige kun tiu datreveno, turista societo „Nigra Pinto“ kaj la Turista Sekcio ĉe BEA organizis la 22-an de septembro j.k. feston en la montodomo, kie estis alvenintaj esperantistoj el Sofio kaj el aliaj lokoj de la lando.

La kantgrupo „Orbita“ malfermis la feston per belaj turistaj kantoj. Ĉesitis ankaŭ eksterlandaj gastoj: Léo de Bruyne — ĝenerala sekretario de Internacia Esperanto-Asocio „Monda Turismo“, José Starck — prezidanto de la Asocio de Blinduloj en Belgio, Monique Kasterker — sekretariino de la belga filio de „Esperantotour“ en Bruselo; Andrzej Pettyn — redaktoro de la Esperanto-emisio ĉe radio „Polonia“, polaj esperantistoj el Zabrze.

En sia salutparolo Dimităr Mutuŝev — prezidanto de la Turista Sekcio ĉe BEA subtekstis, ke en tiu loko antaŭ 25 jaroj por unua fojo eksonis la internacia lingvo Esperanto, dum la konstruado de la montodomo, kiun la sofiaj esperantistoj volonte partoprenis. La feston

partoprenis ankaŭ kelkaj el la tiamaj entuziasmuloj-veteranoj Nikola Nikolov, Minko Conkovski, Stefka Markova, Jordan Ĉaljevski k. a.

La montodomo estas taŭga por renkontiĝoj de esperantistaj grupoj — ĝi disponigas manĝejon kaj 10 dormlokojn. D. Mutuŝev anoncis la turistajn arangojn en Bulgario sekvontjare kaj esprimis esperon, ke la festo de montodomo „Esperanto“ estiĝos tradicia.

La Horo de Sofiaj Esperantistoj prezentis malgrandan koncerton de ŝatataj E-kantoj.

Ege emocia estis la Esperanto-kvizo, kiun partoprenis tri teamoj — de la Centra Estraro de BEA, de la junulara societo „V. Levski“ kaj de societo „Verda Tramo“ — ambaŭ el Sofio. La demandoj kaj respondoj prezentis interesan informon ankaŭ por la ĉeestantaj neesperantistoj.

Similajn turistajn festojn oni devas okazigi pli ofte, por ke ili estiĝu tradicio ne nur por la sofiaj esperantistoj, sed ankaŭ por la tuta bulgara esperantistaro.

Cvetka MITEVA

NOVA INSTRUEKSPERIMENTO

De la 1-a ĝis la 10-a de septembro j.k. en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica okazis E-kurso por ĝelernantoj en la sesa klaso de la Nacia Mezlernejo pri Kulturo.

La ideo pri lernado de la Internacia Lingvo venis de la lernejo mem. La klasgvidantino Stoilĉeva rakontas:

— La Nacia Mezlernejo pri Kulturo, fondita laŭ iniciato de la eksprezidentino de la Komitato pri Kulturo Ljudmila Jivkova, celas eksperimentadon de la ĝenerala programo pri estetika edukado. Ĉefaj taskoj estas multflanka kaj harmonia disvolviĝo de la personeco, propagando de la ideo pri la movado „Standardo de la Paco“. Ekde la unua klaso estas lernataj rusa kaj angla lingvoj. En la lernejo estas fondita ĝelernanta klubo kun tri fakoj: „Unesko“ — pro la fakto, ke ĝi estas inter la asociigitaj en UNESKO lernejoj, „Standardo de la Paco“ kaj „TNTM“ (Teknika kaj Scienca Kreado de la Junularo), kun 51 eksterklasaj ŝatokupoj. Unu el ili estas Esperanto.

Dum dek streĉitaj labortagoj en Pisanica la lernantoj sukcesis tre serioze okupiĝi pri la lingvo. Ilia ĉeesto koincidis kun la Konstanta Internacia Seminario pri Kvalifikado, antaŭ

kies partoprenintoj la junaj talentuloj okaze de la Nacia Festo de Popola Respubliko Bulgario — la Naŭa de Septembro, prezentis riĉan belartan programon en kelkaj lingvoj.

La sukcesa komenca lernado de la Internacia Lingvo estos daŭrigata dum la instruproceso en la lernejo. En la lasta klaso la ĝelernantoj devas fini la instrurajtan kurson de Esperanto. Pere de Esperanto estos pli facile propagandata la ideo de la movado „Standardo de la Paco“, estos efektivigataj diversaj kontaktoj kun infanoj el proksimaj kaj foraj landoj.

La iniciato de la lernejo havas plenan subtenon fare de la Urba Estraro de BEA. La kontrasto pri morala kaj financa helpo flanke de la urba E-organizaĵo jam estas fakto. Estis tempo, kiam ĉio dependis de la iniciato de unuopuloj. Estas sciata, ke instruado de Esperanto en lernejoj en Bulgario, de elementaj ĝis superaj, havas kontentigajn rezultojn. Ĉi-lastata eksperimento plene konfirmas tion. Pere de tiuj eksperimentoj (nur en Sofio ili estas tri) espreble komenciĝos plijuniĝo de la Bulgara Esperantista Asocio.

Nedka VALJAVICARSKA

ĈU LI PRAVAS PRI „NIKARAGUO” ?

Kvankam la titolo de tiu ĉi artikolo komenĝas per „ĉu li“, ne temas pri ankoraŭ unu el la detektiv-rakontoj de Johan Valano. Tamen, elemento de mistero kaj enigmo troviĝas en la diversaj proponoj, kiujn André Albault faras por transskribo en Esperanto de la hispana silabo **gua**, kiu povas aperi komence, interne aŭ fine de la vorto. En unu el siaj artikoloj pri landnomoj, aperinta antaŭ jardeko⁽¹⁾, Albault asimilas la hispanlingvan landnomon **Nicaragua** per „Nikaragvo“. Aliaj landnomoj, kies originala etnolingva formo enhavas la silabon **gua**, estas analogie transskribitaj kaj asimilitaj: Gvatemalo, Paragvajo, Urugvajo.

En 1983⁽²⁾ Albault publikigis pli ampleksan liston da landnomoj kun detalaj klarigoj. Ĉi-foje **Nicaragua** havas la Esperantan formon „Nikaraguo“ sen la **v**-sono en la lasta silabo. Cetere, en la sama traktaĵo, la aŭtoro marteladas la punkton, ke „la Fundamento preskribas, ke litero **ŭ** estu uzata nur post vokalo. . .“ Per tiu „preskribo“ li insistas pri la transskribo de la hispana silabo **gua** (elp. unusilabe kiel „güa“) per „gva“ en Esperanto. Unue, la aserto de Albault, ke temas pri Fundamenta preskribo aŭ regulo estas tute falsa. Nur du el kvin diverslingvaj tekstoj pri la alfabeto de Esperanto mencias ion pri la uzo de „**ŭ**“ nur post alia vokalo. Tiu rimarko troviĝas en la rusa kaj germana versioj, sed mankas en la franca, angla kaj pola. Sekve, 40%-a valideco ne sufiĉas por formulado de regulo. Krome, en la Fundamento ne estas iu ajn eksplicita malpermeso uzi „**ŭ**“ antaŭ alia vokalo. Zamenhof mem faris tion en la interjekcioj „**ŭa**“ kaj „**kŭaks**“, kaj en la literonomo „**ŭo**“. Ankoraŭ unu ekzemplo de la neekzisto de tiu „preskribo“ estas la Esperanta teksto de „Plena Gramatiko de Esperanto“, kiun Zamenhof verkis por Fundamenta Krestomatio. Ĝi tute ne tuŝas la demandon pri la uzo de „**ŭ**“ kun aliaj vokaloj. Estas evidente, ke Albault inventis tiun „preskribon“ por faciligi la altrudon de siaj propraj nocioj pri la esperantigo de loknomoj en Esperanto. Ankaŭ Lawrence Mee⁽³⁾ substrekas, ke la „regulo“ ke „**ŭ**“ povas esti uzata nur post vokalo, estas la persona opinio de Albault kaj ne trovas subtenon en la Fundamento.

Sed la mistera enigmo koncernas la ŝanĝon de „Nikaragvo“ al „Nikaraguo“. Kial malaperis la „**v**“ en la lasta silabo? Nenie en la artikolo estas klarigo, kial Albault modifis ĝuste tiun landnomon, dum „Gvatemalo“, „Paragvajo“ kaj „Urugvajo“ restis senŝanĝaj. Por trovi tiun kialon estas necese ekzameni ankoraŭ unu pub-

likigaĵon de Albault⁽⁴⁾, en kiu li provas pravigi kelkajn el siaj bizaraj landnomaj proponoj. Jen la rimarko pri „Nikaraguo“.

„**Rim.**: la formo kun **-u-** estas nete pli internacia, interalie ankaŭ pro tio, ke la slavoj, kiuj kutime transskribas **gu-** per **gv-**, transskribas ĝin ĉi tie per **gu-**. Kio kondukus al la regulo, ke **gu-** en la lasta silabo de radiko ne ŝanĝiĝas al **gv-** kiel aliloke, sed restas **gu-**“ (pĝ. 16).

Albault nun faras novan „regulon“, efektive escepton de la antaŭe formulita „preskribo“. Ĝi estas aplikebla nur al hispandevenaj loknomoj finiĝantaj per **gua**; krom **Nicaragua**, verŝajne nur ĝia ĉefurbo, **Managua** kaj la sudamerika monto **Aconcagua** bezonas tiun regulon. Nu, kial venis en la kapon de Albault bazi la transskribon de hispanlingvaj nomoj sur la prononcmanniero de slavoj? Ĉi-supre troviĝas la klarigo, ke la hispana **gua** estas prononcata unusilabe, ĉar **ua** estas diftongo; male, en la rusa kaj bulgara **Nikaragua**, la prononco de **gua** estas dusilaba. Tiun malĝustan prononcon, laŭ la vidpunkto de la fontlingvo, la hispana, Albault volas entrudi en Esperanton same kiel en la frua periodo de Esperanto ruse- kaj germane-parolantoj pro sia propra kutimo prononci **gu** kiel **gv** starigis tiun transskrib-kutimon ankaŭ en Esperanto. Tamen, kiu scias la hispanan lingvon, transskribas **ua** ĝuste kiel „**ŭa**“. Troveblas „Nikaraguo“ kaj analogiaj esperantigoj de landnomoj en verkoj de la meksikano Alberto Gómez Cruz⁽⁵⁾, la kataluno Salvador Gumà⁽⁶⁾, la brazilano Leopold H. Knoedt⁽⁷⁾ kaj la brito Lawrence Mee⁽⁸⁾.

Konklude, Albault ne pravas rilate siajn regulojn por la transskribo de la hispana **gua** en Esperanto. La Esperanta formo de **Nicaragua** devas esti nek „Nikaragvo“ nek „Nikaraguo“ sed „Nikaraguo“.

Bernard GOLDEN

NOTOJ:

1. André Albault: Pri landnomoj. Aktoj de la Akademio, 2, 1975, pĝ. 68—71.
2. André Albault: Kontribuo al la Esperanta Toponimiko. Akademias Studoj, 1983, pĝ. 180—195.
3. Lawrence Mee (=Lorenĉ Mi): Kontribuo al la Esperanta Toponimiko. Proponitaj landnomoj. Akademias Studoj, 1984, pĝ. 92—104.
4. André Albault: Paŝo al unueco de nia landnomo. S. d., s.l. 18 pĝ., multobligita.
5. Alberto Gómez Cruz: Clave de Esperanto, 1968, Guadalajara, Meksiko.
6. Salvador Gumà: Pri la landnomoj. Horizonte, vol. 4, n-ro 23, 1979, pĝ. 103—108; Akademias Studoj, 1984, pĝ. 75—79.
7. Leopold H. Knoedt: Pledo por **ŭ**. Monato, vol. 4, n-ro 8—9, 1983, pĝ. 6—7.
8. Vidu noton 3.

TRADICIA FESTO

Ankaŭ ĉi-jare la esperantistoj el urbo Bankja okazis la jam tradicion feston de strato „Esperanto“. La 27-an de julio en la strato kunvenis ĉirkaŭ tricent geesperantistoj el Sofio, Pernik kaj Slivnica. Inter la multnombraj surstrataj arboj etendiĝis girlandoj, improviziata ekspozicio de la esperantisto H. Paŝtrapanŝki el urbo Sliven.

La feston gvidis la 74-jara Boris Popov. Salutarolis B. Haralampiev, sekretario de la partia organizaĵo en la kvartalo, d-ro T. Milev, estrarano de E-societo „Solidareco“ ka.

De kelkaj jaroj la infanoj estas organizitaj en grupo „Standardo de la paco“. Ivanka Spasova kaj d-ro Kojčev instruas al ili Esperanton. Tiuj plej malgrandaj loĝantoj de strato „Esperanto“ plenumis distran programon el versaĵoj, kantoj, skeĉoj kaj anekdotoj.

La kantoj kaj popoldancoj daŭris ĝis noktomezo.

La esperantistoj el Bankja estas tre kontentaj pri la festo de la strato. Ili diras: „Ĝis kiam sur tiu strato loĝas esperantistoj, la festo okazos ĉiujare.“

La estraro de Esperanto-societo „Solidareco“ en Bankja deziras starigi kontaktojn kun organizantoj de similaj festoj el la lando kaj el eksterlando, reciproke gastigi, interŝanĝi sperton. Oni atendas gastojn el stratoj „Esperanto“ en la tuta mondo dum la festo de nia strato en 1986.

Ljubka MANDALOVA

GEMELURBA GEEDZIGO

Tre ĝojan novaĵon eksciis la ŝumenaj esperantistoj de siaj amikoj en la ĝemela urbo Debrecen — Hungario. La 9-an de julio j. k. en la Matrikula oficejo de la urbeto Hadráztéglás geedziĝis post kvarjara konateco Maria Petkova Slaveva (Esperanto-aktivulino ĝisnuna en u. Ŝumen) kaj Géza Kiss, membro de la E-grupo en Téglas.

La geedziĝan solenaĵon ĉestis, krom pluraj esperantistoj, ankaŭ membroj de la Departamenta Komitato Hajdú — Bihar de HEA, kiuj salutis la novajn geedzojn kaj transdonis al ili donaceton.

La ŝumenaj esperantistoj aliĝas al la bondeziroj en „Debrecena Bulteno“: „Ĉiuj deziras feliĉon, sanon kaj multan sukceson al la nova familio Kiss, esperante ke ilia komuna vivo pasos en plena konsento kaj ili dilingente agados ankaŭ por nia „familio“!

Cvjatko TODOROV

IKEBANA PER ESPERANTO

Ĉiusabate posttagmeze la Bulgara Televido prezentas programon „Stil“ („Stilo“) — pri arango de la bulgara domo. La 20-an de julio j. k. en tiu ĉi programo estis montrita dum 9 minutoj „Ikebana“ — arango de floroj — fare de la japanino SAEKO MUTOO. Si jam pli ol 5 jarojn loĝas en Sofio kun sia edzo, la bulgara esperantisto Rašo Dargov. Ili havas 3-jaran fileton Koki. La klarigoj estis en Esperanto. Per tio oni faris tre bonan propagandon de la Internacia Lingvo. El Esperanto en la bulgaran tradukis Vasja Cvetkova, sekretario de MEM.

ANODO

PRODUKTADO SUPER LA PLANO

En sia raporto al la Centra Estraro de BEA la laboristaj kolektivoj de la Distrikta Ekonomia Entrepreno „Globus“ ĉe BEA en Plovdiv kaj Pleven informas, ke kvin monatojn antaŭ la difinita templimo, ĝiaj membroj plenumis la kvinjaran planon por produktado de altkvalitaj kaj variaj varoj por la loĝantaro.

Honore al la antaŭstaranta XIII kongreso de la Bulgara Komunista Partio la kolektivoj promesis ĝis la fino de la kuranta jaro produkti kaj realigi varojn super la planon.

„B.E.“

NOVAJ E-SOCIETOJ

La membro de la estraro de kooperativa E-societo „Verda Stelo“ ing. Veselin Petrov organizis kaj gvidis E-kurson en urbo Senovo, distrikto de Razgrad. Tie, honore al la 41-a kongreso de BEA, oni fondis E-societon „Antaŭeniĝo“. Estis pagita membrokoto por 20 fondintoj, kaj la 41-an nacia E-kongreso partoprenis du delegitoj el la nova societo. La fondkunveno partoprenis la kursgvidanto Veselin Petrov, la prezidanto de DE de BEA — Razgrad, d-ro Ivan Kirčev kaj reprezentantoj de la amas-politikaj organizaĵoj de la urbo. Baldaŭ ekfunkcios dua kurso por komencantoj.

Ankaŭ d-ro Stefan Gjaurov — ĉefo de interna fako de la distrikta hospitalo en Ruse kaj konata urba sociaganto, kun plezuro gvidis la mezlernejan E-kurson, organizitan de la societo „Verda Stelo“. Post la fino de la kurso ĝiaj partoprenintoj fondis lernantan E-klubon „Danubo“ kaj sendis sian delegiton al la 41-a nacia E-kongreso.

J.K.

KREIGAS NOVA TRADICIO

Okaze de la 40-a datreveno de la venko super faŝismo kaj de la 41-a kongreso de BEA en februaro ĉi-jare grupo da amatoraj E-artistoj el Plovdiv gastis al la Sofia E-kulturcentro „M. Gorkij“. Reprezentanto de DE de BEA en Plovdiv informis pri la agado de la distrikta E-organizaĵo. Poste la gastoj prezentis kun granda sukceso riĉan belartan programon.

En julio sofianoj gastis en Plovdiv. En granda bela salono okazis koncerto. La sekretario de la Ĉefurba Estraro de BEA rakontis pri la agado de la Sofia E-organizaĵo.

Paralele kun tiu interesa programo en Plovdiv gastis ankaŭ membroj de la Sofia Literatura Rondo. En la kulturdomo de la instruistoj, en la malnova parto de Plovdiv, ili renkontiĝis kun siaj gekolegoj el la loka Arta Klubo. La gastoj havis eblecon ĉesti la malfermon de ekspozicio de la juna amatora pentristino-esperantistino Mira Minkova.

Ni esperas, ke tiuj komunaj aranĝoj estas bona komenco de unu nova tradicio.

Vladimir JELEV



ESPERANTO-DOMO

La delonga revo de la esperantistaro en Ruse kaj ĝia distrikto havi sian domon — por realigi larĝskalan organizon, kulturen, instruon kaj alian agadon jam efektiviĝas. Sub la gvido de la konstrukomitato, estrata de Georgi Akálliev, en la kvartalo de la supera altlernejo „Angel Kânčev“ — Ruse, komenciĝis la konstruado de la revata Distrikta Esperantista Domo. En la Domo oni akceptos la trapasantajn la urbon geesperantistojn el la tuta mondo. Komenciĝis organizo de libervolaj laborbrigadoj laŭplane flanke de ĉiuj Esperanto-societoj, kluboj kaj grupoj el la urbo kaj la distrikto. La komuna nobla celo estas, ke oni finkonstruu la domon okaze de la centjariĝo de Esperanto, kaj la 26-an de julio 1987 oni solene malfermu ĝin por ekspluatado.

La distrikta Esperantista Domo en Ruse estos digna monumento al la granda filo (laŭ UNESKO!) de la homaro — la pola kuracisto, lingvisto, verkisto kaj batalanto por paco kaj amikeco, por mondo sen armiloj kaj militoj — la geniulo doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Oni planis ankaŭ diversajn aranĝojn honore al la centjariĝo de Esperanto.

J. K.

AMATORA E-TEATRO

Antaŭ 6—7 jaroj la nuna prezidantino de la urba E-societo „Libero“ en Ruse — Nadejda Sirkova, portanto de ordeno „Kiril i Metodij“, organizis ĉe la societo amatoran teatran trupon.

En la trupo grupiĝis fervoraj adeptoj de la teatra arto — Georgi Dobrev, Georgi Venkov, Stefka Ruseva, Ivan Slavov kaj aliaj esperantistoj. Okaze de historiaj eventoj kaj jubileoj la trupo, sub la lerta artgvidado de Nadejda Sirkova, ĉiam preparas novajn emociajn teatraĵojn kiel la angla E-komedio „La gastino“, „Signalparolo“ kun temo el la partizana vivo, versio de „Romeo kaj Julieta“ ka. La spektantoj — esperantistoj el Ruse, Varna, Kŭbrat ka. per aplaŭdoj kaj floroj aprobas la sindonan ludon de la amatoraj artistoj.

Skribante la suprajn liniojn mi min demandas, ĉu iam venos la tempo, kiam BEA iniciatos nacian revuon-konkurson por la amatoraj E-teatroj en nia lando?

Jordan KALINOV

HELPE DE ESPERANTO

La ligoj inter gelernantoj de japana urbo Suita kaj Pazargik (lernejo „G. Dimitrov“) estas starigitaj dank'al la helpo kaj perado de la Distrikta Estraro de BEA kaj Esperantista societo „Radio“. Pentraĵoj de bulgaraj gelernantoj jam estis en Japanio. Kaj jen, somere en Pazargik, sub la aŭspicio de la Packomitato kaj Urba Konsilantaro pri Klerigo, en la sindikata domo la vicurbestro Nikolaj Sopov solene malfermis ekspozicion el pentraĵoj de japanaj kaj pazargikaj gelernantoj. Ĉe estis multaj aŭtoritataj funkciuloj kaj sociagantoj, geesperantistoj, civitanoj kaj gelernantoj.

Por ebligi senperajn kontaktojn perleterajn inter la gelernantoj de ambaŭ urboj, societo „Radio“ organizis kurson de Esperanto nur por gelernantoj el lernejo „G. Dimitrov“. Kaj la rezultoj estas bonaj. Grupo el dek gelernantoj gajnis premion en la Konkurso pri Boteva kaj Revolucia Poezio en urbo Vraca. Aŭtune oni komencis ankaŭ korespondadon.

Estas antaŭvidita gastado de la ekspozicio en la Instituto por Perfektiĝo de Instruistoj en urbo Stara Zagora.

P. A.

INFANAJ DONACOJ

En aprilo 1985 la E-grupo de Moia (Barcelona) en Hispanio aranĝis ekspozicion de infanpentraĵoj pri la naturo.

15 E-gelernantoj el lernejo „Tanja Karpinskaja“ en Gabrovo partoprenis la ekspozicion per siaj pentraĵoj. Fine de julio ni ricevis belajn donacojn de la E-grupo de Moia.

Komence de la nova lernejo ni aranĝis en nia lernejo ekspozicion el la ricevitaj donacoj el Hispanio, el leteroj kaj bildkartoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj Hungario. Tio estas granda ĝojo por la E-gelernantoj kaj bona propagando pri la utilo de la internacia lingvo Esperanto.

S.T.

TURISTA RENKONTIGO

Ci-somere membroj de societo „Kosta Penev“ organizis renkontigon kun turistoj en montodomo, Esperanto — sur Vitoŝa-monto.

Ĉirkaŭ 50 turistoj kaj pli ol 20 esperantistoj realigis neforgeseblan feston, dediĉitan al la Internacia Lingvo.

Mihail Cobanov plenumis diversajn ĥumoraĵojn bulgarlingve kaj en Esperanto. Multaj turistoj interesiĝis pri la Internacia Lingvo. Al iliaj demandoj detale respondis s-ino Ciplakova.

Post tiu emocia renkontiĝo la konkludo laŭ mi estas jena: pli da kontaktoj kun la turistoj, ĉar multaj el ili estas potencialaj esperantistoj!

Stefka DJULGEROVA

KULTURA FESTIVALO

Majo estas la plej bela monato en Svedio. Tial svedaj Esperanto-asocioj tiam aranĝos Kulturen Esperanto-Festivalon. Dum tri tagoj, 16—19 de majo 1986 la festivalo okazos en la malnova studenta urbo Uppsala. Por tiu evento estas bezonataj kulturemaj homoj.

Se vi verkas aŭ povus prezenti teatraĵojn, kabaredojn, muzikaĵojn, kanzonojn ktp Esperante, informu nin pri vi!

Se vin interesas kaj ĝojigas Esperanto-kulturo, notu: KEF, 16—19 de majo 1986, Uppsala, Svedio.

Venu al la Festivalo kiam la printempo vekigas!

750 JAROJN BERLINO

En 1987 la loĝantoj de Berlino festos la 750-jaran datrevenon de sia urbo. Lige kun tio Junulara Esperanto-Grupo (en Berlin-Marzahn) kune kun la subdistrikta estraro de Libera Germana Junularo (FDJ) deziras organizi internacian ekspozicion. Ĝia devizo estas: „Gastoj el la tuta mondo vidas nian Berlinon — urbon de la paco“. Precipe ni turnas nin al junaj esperantistoj kaj al tiuj, kies koro batas por la junularo.

La enhavon de tiu ekspozicio konsistigos fotoj (formato 9×12 ĝis 18×24 cm), desegnaĵoj, bildoj, rakontoj kaj raportoj. Per ili estu videblaj viaj impresoj pri nia urbo:

— Kio plaĉas al vi, kio impresis vin?

— Kiel vi vidis la vivon de niaj civitanoj en batalo por paco?

Ni atendas viajn kontribuojn ĝis la 1-a de oktobro 1986. La ekspozicion oni povos trarigardi en 1987 en pluraj lokoj de Berlino.

Laŭdezire vi ricevos viajn kontribuojn, se vi tion deziras. Al ĉiuj partoprenantoj ni sendos honordiplomojn. La plej bonaj kontribuoj estos premiitaj kaj publikigitaj.

Ni petas vin subteni nian entreprenon kaj per tio pruvi la avantaĝojn kaj la kapablon de Esperanto kiel lingvo kaj kiel movado.

Nia adreso: Junulara Esperanto-Grupo en Kulturbund der DDR/DDR 1141 Berlin-Marzahn, Prignitzstrasse 100 (Ausstellung' 87)

NIAJ PERANTOJ

Britio. S-ro Paul Hewitt, Highfield Road, North Thoresby, Grimsby, South Humberside DN 36 RT.
Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 00 Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.
Slovakia Esperanto-Asocio, Sobotské námestie 6, CS-058 01 Poprad. Jarabono — kiel supre.
Danlando. S-ro J. H. Eriksen, Torholmsvej 26, DK-9800 Hjørring; Poŝtkonto: 771.77 R.
 Jarabono: 38 kr.

Federacia Respubliko Germanio: S-ro Roland H. He-gen, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein.
 Jarabono: 8 DM

Finnlando. Finna Esperanto-Librojo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10.
 Jarabono: 24 fmk.

Francio. S-ro Gilbert Gerrier, Esperantista Federacio de Laboro, 179, rue Ordener, 75018 Paris; tel. 252.19.36
 Jarabono: 20 ff.

Germana Demokratia Respubliko. Esperanto-Asocio, Centra Estraro, Charlottenstr. 60, 1080 Berlin.

Hispanio. S-ro Adonis Gonzales Meana, str. Marcelino Gonzalez, 5—4.º-D Gijón-9 (Asturias); tel. (985) 15 15 34.

Por leteroj kaj korespondadoj: Apartado 242 Gijón-Asturias.

Jarabono: 300 pesetoj.

Hungario: „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443, Budapeŝto.

Jarabono: 60 forintoj.

Japanio. S-ro Yoshiaki Mizuno, 327, Kitairiso, Sayama-shi, Saitama-ken 350—13.

S-ro Namba Syōzi, Hiruiti 3-13-26, Zjoto-ku, Osaka 536.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Kubo. S-ro Pedro P. Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

Luksemburgio. S-rino Germaine Hoffmann, 19, rue J. B. Esch, L-1473, Luksemburgo; tel. 44.49.34.

Madagaskaro. S-ro Justin Randriamampionona, Lot: VA 20-BA Tsiadana, 101, Antananarivo.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Malto. S-ro Anthony Mercieca, 20, Valletta Road, Qormi.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Pollando. S-ro Lech Kosiniak, str. Piękna 16 b/g PL-00539 Varsovio.

Portugallio. Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr Joao Couto, 6 R/C A, P-1500 Lisbono.

Jarabono: 260 eskudoj.

Sovet-Unio. Ĉefperanto Tutunia: Alar Kihum, str. Hiiu 5—5 SU-200016 Tallinn, Estonio.

Jarabono: 5 rubloj.

Perantoj-helpantoj: Johannes Palu, USSR, SU-200016 Tallinn, Sólme 21.

Abomas Laimundas, SU-234432, Jubarko raj., Pilis pšt., Litovio.

Kulikov Vsevolod V., SU-644112, Omsk-112, ab. jaŝĉ. 1624.

Leo Medvedev, SU-129128 Moskva, pr. Mira 196—44.

Svedio. S-ro Tord Suard, Lingvagen 201, S-1235, Farsta.

Jarabono: 5 us. dol.

Usono. S-ro Roy McCoy, 371, Harvard Street Cambridge, Mass. 02138.

Jarabono: 5 us. dol.

ENHAVO

A. ANGELOV — „Ne estas du Bulgarioj!“ . . . II

N. ALEKSIEV — Kun rigardo al la uzinoj . . . 1

P. TODOROV — Internacia simpozio pri turismo . . . 2

R. BANĈEVSKI — KIK—spertoj kaj instruoj . . . 5

A. ANGELOV — Gravega historia evento . . . 6

C. MURGIN — Bulgara antologio . . . 8

M. JANKOVA — Vizito de japanaj pacamikoj . . . 9

N. NIKOLOV — Esperanto en la Internacia Danuba

Remado . . . 10

CV. MITEVA — Montodomo „Esperanto“ jubileas . . . 11

ST. DANĈEV — Mia fenestro al la mondo . . . 12

B. GOLDEN — Ĉu li pravas pri „Nikaraguo?“ . . . 13

KR. BLAGOV — Unu viro, unu jakto kaj la oceano . . . IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

Fratoj Asen kaj Petăr—gvidantoj de la ribelo.

Grafikaĵo de Angel Angelov

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La redakcio akceptas la originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomon kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondadojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuj post la evento. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuadoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aperos en „BE“ post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

KONTAKTU PACAMIKOJN!

La Distrikta Estraro de BEA — Veliko Târnovo, Bulgario, deziras kontaktigi la distriktan porpagan komitaton en la sama urbo kun similaj neesperantistaj komitatoj kaj movadoj — pere de E-korespondado. Esperanto-kluboj kaj aktivuloj en alilando estas petataj esprimi sian konsenton kontribui. Skribu laŭ adreso. Hristo Marinov, „L. Karavelov“ 22, 5 180 Polski Trâmbeŝ, Bulgario.

Vjetnamio. Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107, Quan Thanh, Hanoi. S-rino Vũ Thanh Huang, 20 Ly Thai To Vie
 Vien Ngón ngu hoc, Hanoi.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar HAGIEV, Krâstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

tel. 31-70-19

1 000 Sofio

Ŝtata preseo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

UNU VIRO, UNU JAKTO KAJ LA OCEANO



 Felĉan revenon, kapitano! . . .

Foto: Ivan Grigorov

Je unua rigardo, sur la terglobo ne plu estas „blan-kaj makuloj“ — ŝajnas al ni, ke ĉiu teranguleto jam estas travagita, ĉiuj eblaj veturadoj estas efektivitigitaj. Nian planedon oni ĉirkaŭveturis laŭ ĉiuj eblaj manieroj — sur akvo kaj tra la aero, per ĉevalo kaj biciklo, kaj eĉ trans la polusoj. La vojaĝantoj, pretaj elsuferi ĉiajn elprovojn, por unuaj atingi la celon, kun pasado de la tempo komencis ĉiam pli kaj pli komplikigi sian taskon, por superi la antaŭajn atingojn. Kaj kvankam la oceano ne estas stadiono, oni ne povus elekti pli ĝustan vorton ol rekordo, por karakterizi la navigadojn de la anglo Francis Chichester kaj de la franco Alain Colla, kiuj solaj per siaj jaktoj ĉirkaŭveturis la mondon laŭ la plej malfacila itinero — ĉirkaŭ la Horna Kabo, kaj per nur unu albordego — en Sidnejo. Ili ne plu estas inter la vivantoj, sed oni ĉiam memoros ilin kiel pionirojn, kiuj ege plilargigis nian imagon pri la limo de la homaj ebloj.

Vice kun iliaj nomoj staras la nomo ankaŭ de unu bulgara velboatisto — Nikolaj Gambazov. Antaŭ ne longe, ĉirkaŭveturinte la Teron laŭ la sama itinero, li revenis en la Nigramaran havenurbon Burgas. Unu „detalaĵo“ tamen aldonas apartan valoron al lia navigado — li mem, propramane, konstruis sian jakton „Tangra“.

Tio estis unu el la plej mallongaj kaj samtempe plej longaj ĉirkaŭmondaj navigadoj. Mallonga kompare kun la atingoj de aliaj velŝipistoj, kiuj aŭdacis solaj ĉirkaŭnavigi la Teron. Gambazov forlasis la bulgaran havenon Sozopol en 1983. La 31-an de oktobro de la sama jaro li oficiale startis de la Kanariaj Insuloj

kaj la 1-an de marto 1984 atingis Sidnejon. Post dekmonata restado en Aŭstralio, la 1-an de januaro 1985 li fornavigis kaj la 13-an de majo 1985 denove atingis Las Palmas, tranavigante 27 mil mar mejlojn en daŭro de 253 tagoj. Tio signifas pli ol 100 marmejloj potage — bonega velŝipista atingo.

Sed por Gambazov mem tiu navigado havas dekjaran historion. Kvankam naskita antaŭ 42 jaroj en Sofio, malproksime de la maro, li estas hereda maristo — lia patro kiel ŝipa radiotelegrafisto tranavigis ĉiujn oceanojn, kaj Nikolaj mem estas kapitano de la ŝipo „Titania“ en haveno Burgas. Sian revon ripeti la navigadon de Francis Chichester li komencis realigi en 1974, kiam en la domkorto de malgranda Sofia antaŭurbo li mem, sola, komencas konstrui sian jakton „Tangra“ (Tangra estas la nomo de antikva bulgara pagana dio). Kvankam ĝi estas konsiderinde pli malgranda ol la jaktoj de Chichester kaj Colla (longa entute 11 metrojn), dum ses jaroj ĝi forrabas al li la tutan liberan tempon kaj ĉiujn sparaĵojn. Nekonata, rigardata de la ceteraj kun miro, malkompreno, foje eĉ kun ironio, Gambazov tamen sukcesas finkonstrui ĝin kaj en 1980 sukcese partoprenas la transatlantikan regatton por solecaj marnavigistoj „Ostar“, kie „Tangra“ montris tre bonajn navigovojajn kvalitojn. Sed ankaŭ tiu elprovo, kiu alportis al li rekonon kaj altajn sportajn kaj ŝtatajn distingojn, estis por li nur etapo al preparo de la ĉirkaŭmonda navigado.

La sukceso ĉiam ŝajnas facila, post kiam ĝi estas atingita, sed por kompreni je kia prezo Gambazov atingis ĝin, oni devas akcenti sur du plej dramecaj epizodoj de lia navigado, kiuj kaŭzis sendormajn noktojn al centoj da homoj ne nur en Bulgario, sed en la tuta mondo. Tio estis en februaro 1984 kaj februaro 1985, kiam pro difekto en la radiostacio la ligo kun „Tangra“ estis interrompita. En la unua okazo Gambazov jam proksimiĝis al Sidnejo. Dum kvar tagnoktoj ŝipoj kaj aviadiloj de la marborda gardistaro sensukcese serĉis la jakton, kaj la aŭstralia gazetaro, kiu kun intereso observis la navigadon, informis, ke Gambazov estas malaperinta. Iom poste oni malkovris lin nur je kelkdeko da mejloj for de la haveno de Sidnejo.

La duan fojon la malinformiteco daŭris pli longe. La 13-an de februaro 1985 ŝtormo difektis la antenon de la radiostacio en la sudorienta parto de la Pacifiko. Laŭ peto de la bulgara registaro la argentina aŭtoritatoj komencis elserĉadon, kiu estis ĉesigita apenaŭ kiam du semajnojn pli malfrue angla ŝipo renkontis Gambazov jam en la Atlantika Oceano. Dum tiu tempo, pro kaprico de la vetero, li pasis du fojojn, preter la Horna Kabo! — post la unua preterpaso forta vento estis reveniginta lin de la Atlantika Oceano de nove en la Pacifikan.

Pri tiu sia navigado Gambazov verŝajne verkos libron. Sed kvankam li ankoraŭ ne havis tempon rakonti ĉiujn detalaĵojn, lia navigado jam estas tre populara en Bulgario. Laŭ informoj de la Stata Ŝipnavigacia Inspektado jam kelkdekoj da entuziasmoj, simile al li, mem konstruas jaktojn. Du el ili — Vasil Kurtev kaj Dimitar Ivanov jam transnavigis la Atlantikan Oceanon per siaj navigiloj — la unua en „Ostar-84“, kaj la dua — somere de 1985, simile al Alain Bombard, sen provizo de trinkakvo.

En la maro, diras Gambazov, oni plej bone komprenas sian propran valoron. Tie oni rigardas la veron rekte en la okulojn. Kaj tiu vero laŭ li estas: unu viro, unu boato. . . kaj la oceano.

Krum BLAGOV